ISSN 0014-0635
90-a jaro • n-ro 1090 (3) • **marto 1997**

# ESPERANTO

Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

## Zamenhof-tago en 24 landoj, de futbalo ĝis poezio

## Kalendaro 1997

## 13-a *Influo*: Efika debuto de brazila rebatservo




# La sorto de niaj bibliotekoj

# Enhavo


41 Tutmonde: Nia plej propra festo en 24 landoj
42 Kia sorto por la bibliotekoj? (Detlev Blanke);
Taskoj por pluraj laborjaroj (Roland Rotsaert);
Bibliotekoj, rete
44 Plua apogo en EP
45 Akademio de Esperanto: Enketo pri landaj institutoj
(YAMASAKI Seikô)
46 Radio: Rekorda korespondemo ĉe Pola Radio (Andrzej Pettyn)
Faka agado: UEA kaj FA-j: Reciproka helpo (Amri Wandel);
KSM reprosperas
47 Speciala sekcio: *Influo* numero 13
51 Kalendaro 1997-98
55 Laste aperis
56 Libroservo: Kuraĝigaj ciferoj
El la vivo de la CO
57 Loke
58 Anoncetoj
Oficiala informilo
59 Fake
Libro pri Hermann
Nekrologoj
60 Omaĝo (Marc Levin)


# Vi trovos

vin en elekto-embaraso pro la abundo de pli ol 150 Esperantaj eventoj en nia ĉi-marta "Kalendaro" (p. 51-54) — kaj sciu ke la spaco eĉ ne sufiĉis por transpreni ĉiujn informojn pri ĉiuj aranĝoj tutmonde! Alia kutima rubriko estas la furor-listo de plej vendataj titoloj de la UEA-Libroservo (p. 56), en kiu respektindan lokon okupas tiaj "pezaj" legaĵoj kiel *La serĉado de la perfekta lingvo* de Eco kaj *La metamorfozo* de Kafka. La akompanaj ciferoj montras certan altiĝon en la enspezoj de la Libroservo. Modestan kreskon indikos, cetere, ankaŭ la membro-statistiko de UEA en 1996, kies definitivigo ankoraŭ daŭras — ĝis nia aprila numero.

Malofte okazas ke ni ĉefartikole traktas tre similajn temojn kun nur kelkmonata intervalo: post novembra intervjuo pri Internacia E-Muzeo en Vieno, jen nun faksperta tipologio de Detlev Blanke pri la E-bibliotekoj (p. 42-43). Tamen, bibliotekoj estas tiel grava parto de nia komuna Esperantujo — fakte, ties plej tuŝebla materia manifestiĝo — ke pri ili apenaŭ eblas satparoli.

*La kovrilo:* La Roterdama Urba Biblioteko havas centojn da Esperantaj libroj sur siaj bretoj por publika uzo.


**ESPERANTO**

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Aperas** monate (escepte de aŭgusto). **Redaktofino:** la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

**Redaktoro:** István Ertl.

**Abonprezo:** varias laŭlande (gld. 61; US$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

**Anonctarifo** (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

**Manuskriptoj:** Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

**Adreso:** Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

**Telefono:** +31-10-436-1044.

**Telefakso:** +31-10-436-1751.

**Elektronika poŝto:** uea@inter.nl.net.

**Telegramoj:** ESPERANTO ROTTERDAM.

**Banko:** Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

**Kreditkartoj:**

**Ĝenerala Direktoro:** Osmo Buller.

**Direktoro de la CO:** Pasquale Zapelli.


## Estraro de UEA


**Prezidanto** (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ℻ +82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

**Vicprezidanto** (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

**Ĝenerala Sekretario:** s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ℻ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mclink.it.

**Estrarano** (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ℻ +31-50-3613763 [of]; ✉ a.f.de.geus@td.azg.nl.

**Estrarano** (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ℻ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

**Estrarano** (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ℻ +370-7-228616 [of].

**Estrarano** (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ℻ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

# Nia plej propra festo en 24 landoj

**Ekde nia februara kompilaĵo (p. 26), el 19 pluaj landoj venis raportoj pri la solenado de la 137-a naskiĝ-datreveno de Zamenhof, kies 80-a morto-tago estos memorata la 17-an de la venonta aprilo. Krom se alie indikite, la menciitaj eventoj okazis la semajnfinon de 14-15 decembro.**

### Benino

La anoj de la klubo Amikeco en la ĉefurbo Cotonou kunvenis sur mara plaĝo. Paroladon pri Zamenhof kaj E-kurson sekvis festeno kun muziko. (S. Essou)

### Bosnio kaj Hercegovino

Aŭskultinte solenan paroladon de Šefik Rizvanović, sekretario de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, kvindek lernejanoj el kvin Sarajevaj E-kursoj prezentis kantan kaj deklaman programon kaj regalis sin per kukoj senditaj de la E-grupo en Saint-Nazaire (Francio). La ĵurnalo *Dnevni avaz* publikigis longan artikolon pri Zamenhof. (ELBiH)

En Banja Luka malfermiĝis en la universitata biblioteko ekspozicio de libroj, gazetoj kaj diversaj esperantaĵoj. Samloke okazis la jarkunveno de E-Ligo de Respubliko Serba, amuza vespero dediĉita al Zamenhof, kaj ekzameno por finintoj de baza kurso. (R. Petroviĉ)

### Brazilo

En Rio-de-Ĵanejro instruisto Jair Salles prezentis al la ĉeestantoj la poeton kaj lingvoinstruiston Domingos dos Santos, kiu finis bazan E-kurson kaj deziras verki siajn poemojn en Esperanto. Elma do Nascimento lanĉis sian infanlibron *La magia ĉevaleto*, Jair Salles la duan eldonon de sia lernilo *Esperanto Conversacional*, kaj Sylla Chaves parolis pri siaj aperontaj *Didaktika vortaro* kaj *Praktika vortaro*. (*INKO*)

### Bulgario

Por eviti eventualajn frostojn, la E-societo en Pazarĝik festis jam komence de decembro, gratulante en plenplena klubejo plurajn jubileantajn societanojn. Nome de ili la 90-jara Kosta Konstantinov dankis per rememoroj kaj kantado, akompanante sin per ŝalmo. (P. Arnaudov)

### Estonio

En la oficejo de E-Instituto de Estonio en Tallinn 17 personoj ĉeestis feston, kiun sekvis estrar-kunveno de E-Asocio de Estonio. (*Informoj de EAE*)

zairia movado kaj sia projekto traduki proverbaron de sia lando al Esperanto. (*Berlina Informilo*)


Foto: Wu Jie

### Ĉinio

Post Zamenhof-festo kun 40 partoprenantoj, membroj de Dandong-a E-Asocio fotiĝis kun usona gastino. (MA Fengchen)

### Francio

En Nantes René Centassi, kunaŭtoro de la Zamenhof-biografio *L'homme qui a défié Babel*, prelegis pri Jules Verne. Estis prezentitaj la filmo *La diktatoro* de Chaplin kaj la romano *La morto neniun forgesas* de Didier Daeninckx, tradukita de la klub-prezidanto Christian Rivière (vd. p. 55). (*Franca Esperantisto*)

### Germanio

Post komunaj programeroj — solena alparolo, kvar-muzikila serenado kaj inaŭguro de ekspozicio de pentraĵoj de e-istoj el la tuta mondo —, la festantoj en Potsdam (apud Berlino) povis elekti inter paralelaĵoj: Ulrich Becker parolis pri sia libro *La aĵoj kaj la sezonoj* kaj la lignogravuraĵoj kiuj ĝin ilustras; Michael Peters prezentis kaj vendis, kontraŭ memproduktitaj "steloj", komputile manipulitajn portretojn de Zamenhof; kunsidis la provizora LKK de la Berlina UK (1999); Crispin Niansi Nkunku (vd. feb, p. 37) parolis pri la

Dekduo da kunvenintoj restarigis en Kijlo (Kiel) la tradician E-klubon, unue fonditan en 1902. La nova klubo aliĝis al laborgrupo de eksterlandaj asocioj en la urbo, kio donos al ĝi okazon starigi informstandon ĉe internacia renkontiĝo en majo. (C. Darbellay, S. Meyer)

### Hispanio

E-istoj el la urboj Avilés kaj Gijón demetis florbukedon en la strato Esperanto de Avilés kaj aŭskultis E-lingvan meson en preĝejo proksima al tiu strato. Antaŭ restoracia bankedo Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) prelegis pri "La nuna E-movado". (*Antaŭen*)

En Sabadell ĉirkaŭ 70 e-istoj kaj simpatiantoj metis florbukedon ĉe la Zamenhof-monumenton kaj al la nomtabulo de gramatikisto Lluis Mimó Espinalt, en pasejo portanta ties nomon. Inter la solenantoj estis la vidvino kaj filo de Mimó Espinalt. (*KAE-Informilo*)

*(daŭrigo sur p. 44)*

# Kia sorto por la bibl

**Intervjuo kun Herbert Mayer (nov. '96, p. 182) kaj januara cirkulero de Roland Rotsaert, kiu avertas ke eventuale ne plu daŭros la flegado de la granda Esperanto-kolekto en Kortrijk (Belgio), instigis la aŭtoron al ĉi tiu artikolo.**

La Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj konservas dokumentojn pri la teoriaj kaj praktikaj klopodoj realigi malnovan revon de la homaro, serĉi, por paroli Eco-e, "perfektan" lingvon por sendiskriminacia internacia komunikado. Tamen, ĉu ni vere sufiĉe konscias ke la plua ekzistado de multaj valoregaj kolektoj — rezultoj de jardekojn longa kolektado, de investo de multa spirita energio, tempo kaj mono — povas esti en danĝero?

Kio do okazos, se privata kolektanto forpasos kaj la familianoj ne pretos aŭ simple ne povos daŭrigi la prizorgadon de la kolekto? Eble la landa asocio — se ĝi entute havas la necesajn komprenon, emon, ejojn, homojn kaj financojn — transprenos parton de la libroj? Kaj ĉu la aliajn materialojn oni eble vendos aŭ disen fordonacos? Kaj kion pri dokumentoj kaj arkivaĵoj?

La aparta signifo de multaj kolektoj ofte konsistas ne nur en ties libroj sed ankaŭ en ties diversaj sliparoj, katalogoj, kartaroj, amaso da specifaj dokumentoj. Estas pli malfacile transdoni aŭ konservi ilin ol librojn. Tre ofte la sliparoj kaj dokumentaroj estas rekte ligitaj al la libraro kaj referencas ĝin. Sekve, la apartan valoron de multaj kolektoj difinas ilia specifa konsisto. Pro tio ja necesus zorgi ke la kolektoj ne estu disigataj.

## Taskoj por pluraj laborjaroj

*El letero de Ronald Rotsaert, prizorginto de la Esperanta kolekto en Kortrijk:*

Kun bedaŭro mi anoncas ke mi ĉesigos mian laboron en Fondaĵo Vanbiervliet de la urba biblioteko de Kortrijk. Kiam mi, meze de 1995, komencis labori tie unu tagon monate, mi esperis ke post unu-du jaroj estos skipo por transpreni la prizorgon de la biblioteko. Mi mistaksis la taskon. Por enordigi la bibliotekon estas bezonataj volontuloj kiuj egalas al unu plentempa laboranto dum unu jaro. Enkomputiligon de la kolekto de Kortrijk, bazitan sur ekzistanta katalogo de alia biblioteko, mi taksas je plia laborjaro. Korespondante kun aliaj bibliotekoj mi konstatis ke Kortrijk ne estas la nura E-biblioteko kun manko de prizorgo. Ni ne esperu ke la registaroj dungos personojn por prizorgi niajn kolektojn. La movadanoj mem devos tion fari.

Mi dankas ĉiujn kiuj dum la pasintaj du jaroj asistis min per helpo kaj konsiloj.

*Roland Rotsaert*
*Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio*
*rotsaert@knooppunt.be*
(Fonto: Interredaktore)

Por pli klare prezenti la eventualajn danĝerojn minacantajn, ni klopodu fari tipologion de la Esperanto-bibliotekoj[1] laŭ ilia jura statuso proprieta, ĉar tiu statuso influas ilian perspektivon.

1. *Kolektoj en ŝtataj aŭ naciaj bibliotekoj:*

1.1. relative memstara, daŭre prilaborata kaj buĝetata *konstitua parto de nacia aŭ ŝtata biblioteko kun pagataj bibliotekistoj* (plej klara ekzemplo: Internacia Esperanto-Muzeo [IEM] en la Aŭstria Nacia Biblioteko);

1.2. *integra subkolekto en ŝtata biblioteko sen aparta speciala prizorgado kaj pligrandigo* (ekz. la biblioteko de la iama Germana Esperanto-Instituto, en la jaro 1936 sendita al la siatempa Prusa Ŝtata Biblioteko en Berlino).

La perspektivo de tiaj bibliotekoj ŝajnas relative sekura. Tipo 1.1. povus kreski, tipo 1.2. ne nepre.

2. *Kolektoj en komunumaj bibliotekoj:*

Al ili apartenas ekz. Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), oficiala parto de la biblioteko de la svisa urbo La Chaux-de-Fonds, aŭ la kolekto de la urba biblioteko en Kortrijk (Belgio), la itala Nacia Esperanto-Biblioteko kaj -Arkivo en Massa, kaj la franca Nacia Esperanto-Muzeo en Gray. Ilia estonteco tre dependas de tio ĉu ĉiam troviĝos laborpretaj kaj kompetentaj prizorgantoj/ arkivistoj honoroficaj, ĉar ĝenerale la komunumaj instancoj apenaŭ pretas multe investi en kolektoj tiom ekzotikaj kaj relative malmulte konsultataj.

3. *Bibliotekoj rekte ligitaj al difinitaj sciencaj institucioj, ekz. al universitatoj.*

Tio koncernas i.a. la kolekton de la universitata biblioteko de la pola urbo Toruń. Ankaŭ ĉe tiu ĉi tipo la bonfarto multe dependas de la engaĝiĝo de esperantistoj.

4. *Bibliotekoj de organizaĵoj povas esti:*

4.1. *kontraktita parto de neesperantistaj instancoj*, ekz. la biblioteko de Germana Esperanto-Instituto (fakte propraĵo de Germana Esperanto-Asocio), kiu troviĝas en la urba biblioteko de Aalen. Kio okazos post eventuala nedaŭrigo de la kontrakto?

4.2. *lokita en propra asocia sidejo*, ekz. Biblioteko Hodler (en la Centra Oficejo de UEA, Roterdamo) aŭ Biblioteko Butler (ĉe Esperanto-Asocio de Britio, Londono). Kio okazus, se la asocioj perdus siajn oficejojn?

4.3. Iom specifa tipo de ĉi tiu grupo estas la *klubaj bibliotekoj*, kiuj foje estas tre riĉaj. Alarma ekzemplo:

La tre valora biblioteko de Praga E-Klubo trovis post 1968 lokon en la siatempa oficejo de Ĉeĥa E-Asocio. Lige kun la politikaj ŝanĝoj (1989) kaj la ĝenerala malfortiĝo de la Esperanto-movado en la orient-eŭropaj landoj, okazis ĝuste tio kion mi aludis sub 4.2: ĈEA ne plu povis financi sian oficejon. La pli ol 5000 libroj ne malaperis en rubujon sed feliĉe iris al aliurba muzeo, kiu tamen estas malfacile alirebla. Ĉu por ĉiam ili restos tie?

5. *Pure privataj kolektoj.*

Ili ofte donis la fundamenton por tiuj sub 1.-4.

5.1. *Private publikaj bibliotekoj.* Ili servas unuavice ne por la esploroj de la posedanto. Tiu donacas ĝin al la socio aŭ al la movado. Tiaj bibliotekoj estas bone uzeblaj aparte por fakuloj. Ili ofte estas ege riĉaj kaj bone ordigitaj.

## iotekoj?



Foto: Budapeŝta Informilo

**Károly Fajszi en sia Budapeŝta biblioteko, probable la plej granda privata kolekto en la mondo, kun pli ol 20 mil dokumentoj.**

5.1.1. Ĉe iuj el tiuj bibliotekoj, ekz. la riĉa kolekto de Károly Fajszi en Budapeŝto, oni klopodas eviti la danĝerojn komence skizitajn kaj trovis *ŝtatan protekton*. La posedanto kontraktis kun la hungara kulturministerio ke tiu protektu la bibliotekon kaj zorgu pri ĝi post la forpaso de la posedanto. Kompreneble, oni povas nur esperi ke en kazo de bezono efektive disponiĝos la necesaj financoj, afero ne tute certa en la nuna tempo.

5.1.2. Aliaj bibliotekoj *ne havas tian perspektivan antaŭarangon*. Se mi ne eraras, tio validas por la unika Hispana Esperanto-Muzeo, kreita de s-ro Luis Hernández Yzal en Sant Pau d'Ordal. Eternan vivon al li, sed kio poste?

Konceptitaj por movade publika uzo, 5.1.1. kaj 5.1.2. ne disponeblas por nemovada interbiblioteka pruntado.

5.2. Sufiĉe disvastiĝinta estas dua subtipo de privataj bibliotekoj: *personaj esplorbibliotekoj*. Ili estiĝis laŭ la sciencaj interesoj kaj bezonoj de la posedantoj kaj ne estas publike alireblaj, tamen ofte ja konsulteblaj por seriozaj interesatoj, fakaj kolegoj kaj esplorantoj, kiuj trovis aranĝon kun la posedanto.

Tiuj kolektoj ĝenerale estas aparte riĉaj je science gravaj dokumentoj aŭ aliaj specifaj materialoj (sliparoj, katalogoj, sonregistroj de sciencaj aranĝoj k.s.). Ĉe multaj el ili la plua ekzistado ne estas jure certigita. La materialo devus resti kune, eventuale eĉ en la sama urbo. Sed kion fari, se neniu universitato, akademia institucio, nek la landa asocio k.s. povas transpreni kaj flegi la kolekton?

Nur en tre maloftaj kazoj la familianoj de forpasinta kolektinto pretas kaj kapablas (kio ne estas la sama) plu zorgi pri la fizika konservo kaj intelekta flegado de la kolekto aŭ eĉ mem volas uzi ĝin same kiel la fondinto.

Ĉe la fino de ĉi tiu tipologio, certe mankohava, mi volas substreki ke ĉiuj menciitaj bibliotekoj tre dependas de la konkreta uzado, subteno, eĥo kaj helpado fare de la esperantista movado. Tion ni ja konsciu. Tamen, plej endanĝerigita en sia plua ekzistado ŝajne estas tipo 5.

Bedaŭrinde la Esperanto-movado ne havas ĝeneralan strategion pri siaj propraj spiritaj kolektoj. Ofte mankas kompreno, homaj fortoj, loko kaj financoj. Tiu situacio nepre postulas drastan ŝanĝon. Estus necese konstrui reton kiu kontaktigus ĉiujn diverstipajn bibliotekojn kaj kolektojn, da kiuj ekzistas pli ol cent en la mondo.[2] Spertinterŝango povus tre helpi pri iliaj multaj similaj problemoj kaj taskoj, i.a.:

1. registrado de la materialo (katalogoj, bibliografioj), aparte elektronike;
2. akirado de materialoj;
3. malmultekosta flegado kaj riparado (inkl. surfilmigon de aparte valoraj aŭ disfalemaj materialoj);
4. interŝanĝo de duoblaĵoj;
5. bibliotektipa eldonagado;
6. interŝanĝo de spertoj kaj ideoj pri la jura certigo de la plua ekzistado de la kolektoj;
7. mobilizado de movadaj kaj nemovadaj fortoj (i.a. financaj kaj homaj) por la bono de la kolektoj;
8. reciproka morala kaj alispeca subteno en krizaj situacioj (se ekz. minacas likvido de kolekto k.s.).

Jen temoj por aperigo en aparta bulteno, eble kun la titolo *Interbiblioteke*? Kiu redaktus ĝin? Se ĝi ne baldaŭ realiĝos, mi pretas aperigi konvenajn artikolojn en *Informilo por Interlingvistoj*, redaktata de mi por Centro de Esploro kaj Dokumentado.

*Detlev Blanke (Germanio)*
*Otto-Nagel-Str. 110*
*DE-12683 Berlin, Germanio*
*☎+49/30/541-26-33, 🖷545-67-42*

NOTES

[1] Ni ĉi tie ne distingas inter "bibliotekoj", "kolektoj", "muzeoj", "arkivoj" k.s. "Kolekto" inkludas bibliotekon, arkivon kaj aliajn plej diversspecajn arojn de materialoj pri planlingvoj, aparte pri Esperanto en teorio kaj praktiko. Ĉiuj tiaj materialoj povas esti valoraj por specifaj interlingvistikaj/esperantologiaj studoj. Ĝenerale la plej grandan parton de la kolektoj konsistigas libroj.

[2] En la 15-a Esperantologia Konferenco (77-a UK, Vieno 1992), d-ro Árpád Máthé prezentis superrigardon pri ĉ. 120 bibliotekoj en pli ol 30 landoj. Lia materialo bedaŭrinde ankoraŭ ne aperis presita.

## Bibliotekoj, rete

**TTT-paĝoj**

Esperanto-bibliotekoj: http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/bibl/
Internacia Esperanto-Muzeo (IEM): http://www.onb.ac.at/intespm.htm
Germana Esperanto-Biblioteko (Aalen): http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/aalen/

**Kelkaj retpoŝtaj adresoj**

Biblioteko Butler: <eab@esperanto.demon.co.uk>
Biblioteko Hodler de UEA: <uea@inter.nl.net>
Germana Esperanto-Biblioteko: <kh.schaeffer@t-online.de>
Hispana Esperanto-Muzeo: <muzeo.esperant@redestb.es>
Internacia Esperanto-Muzeo: <mayer@grill.onb.ac.at>
Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco (Uzbekio): <museum@sam.silk.org>

*Laŭ informoj de Martin Weichert*
*<martinw@cs.chalmers.se>*

(daŭrigo de p. 41)

**Jugoslavio**

En la jarkunveno de Serbia E-Ligo, en Beogrado, estis elektita nova estraro. Re-prezidantiĝis Zoran Ćirić, kiu gvidas ankaŭ Serban Junularan E-Organizon. Estrarano de SEL pri informado estas Renato Petroviĉ, sendinta ĉi tiun informon.

**Kamerunio**

En la ĉefurbo Duala, la ĵus naskita Duala Konversacia Rondo festis sian unuan Zamenhof-tagon per tre laŭte kantata "La Espero", kaj per alparoloj de prezidanto Thomas Wang kaj sekretario Victor Nto Nto (intervjuon kun tiu lasta vd. en okt., p. 171). Dum manĝado kaj trinkado oni aŭskultis kasedojn kun la voĉo de Hans Bakker. Multaj decidis eklerni Esperanton. (V. Nto Nto)

**Kroatio**

Zamenhof-tago en la nacia televido: la 16-an de dec. Vida Jerman recitis en aparta elsendo, antaŭ plenega salono de la prestiĝa Muzeo por Arto kaj Metio, el siaj novaj kasedoj *Izolulo* kaj *Inventante ke mi sonĝas* (vd. "Laste aperis", p. 55). La teatran agadon de Jerman prezentis akademiano Dalibor Brozović — Honora Patrono de UEA kaj prezidanto de Kroatia E-Ligo — kaj d-ro Branko Hečimović, direktoro de Teatrologia Insitituto. La specialan kultur-pontan rolon de Esperanto verve emfazis d-ro Ante Stamač, prezidanto de Kroata Asocio de Verkistoj. Ĉeestis la 91-jara kroata bardo Dragutin Tadijanović, kies poemaron *Kanto al mia koro* esperantigis kaj publikigis antaŭ 60 jaroj Josip Velebit. Alian elsendon pri Jerman, dediĉitan al ŝia Esperanta laboro, montris la televido OTH la 20-an de dec. En la lasta tago de la jaro, e-istoj gastis (post pluraj similaj fojoj dum la jaro) en la programo "Ĉirkaŭbraku la mondon", per duonhora programo pri siaj japanaj-kroataj rilatoj. (S. Štimec)



Fondita la 14-an de decembro 1991, Kroata E-ista Unuiĝo solenis en Zagrebo sian kvinjariĝon. Ĝia granda konsilio elektis sepkapan malgrandan konsilion, kiu gvidos KEU dum la venontaj jaroj. Prezidanto Radenko Milošević disdonis dankdiplomojn al individuoj kaj institucioj, i.a. kelkaj internaciaj E-redakcioj gazetaj kaj radiaj, kiuj subtenis la agadon de KEU. La ĉeestantoj havis okazon subskribi la Manifeston de Prago. Pri la programo informis tagaj gazetoj kaj radio. (M. Belošević)

**Madagaskaro**

La urbestrino kaj aliaj aŭtoritatuloj honoris per vizito la Zamenhof-feston kiun en la urbo Manjakandriana, je 47 kilometroj de la ĉefurbo Antananarivo, kune solenis la kluboj Tana, La Espero, La Paco, Steloma kaj Estonteco. (E. Raveloson)

**Rusio**

En Moskvo oni spektis du E-filmojn kaj ĝuis E-koncerton en la hungara ambasadejo, laŭ invito de la esperantista ambasadoro György Nanovfszky. Ĵurnalisto Eŭgeno Nikitin, korespondanto de la agentejo ITAR-TASS, verkis kun simpatio pri la evento; E-traduko de lia teksto aperis en la dumonata revuo *Scienco kaj kulturo*.

**Srilanko**

Pli ol 55 E-lernantoj kaj membroj de la E-centro en Jaela aŭskultis en la aŭditorio de kolegio Christ King (Tudella, Jaela) prelegon de U. Zeiter Perera pri Zamenhof. Ŝakludan konkurson sekvis vespera ĝojfesto kun drametoj pri paco kaj mond-trankvilo. (S.C. Janzse)

**Svislando**

Agrable kunfestis la 7-an de dec. en Bazelo kvindeko da e-istoj el Francio, Germanio kaj Svislando, t.e. el la nove baptita eŭro-regiono "Trirhena". (*Franca Esperantisto*)

**Togolando**

Post matena futbalmatĉo, en kiu la teamo de la togolanda esperantistaro malgajnis je 0:4, sekvis en klasĉambro de evangelia lernejo en Lomé priparoloj por la organizado de Kvara Kongreso Nacia, prelego de Felix K. Halaoui pri Zamenhof, kaj festa kunmanĝo. (*Kajeroj el la Sudo*)

**Usono**

En la festo de E-Societo de Novjorko "esperantistoj de la jaro" fariĝis Paul Lynch kaj Pamela Lieber, pro sia helpo dum la pasint-somera jarkongreso de la landa asocio ELNA. Gastino Zsuzsanna Berényi el Hungario prelegis pri framasonismo, kies usonan historion ŝi esploras. (*Novjorka Prismo*)

**Vjetnamio**

La 9-an de decembro oni solenis la 40-an datrevenon de la fondiĝo de Vjetnama Esperanto-Asocio, kiu pasintjare fariĝis landa asocio de UEA.

**Zairio**

Movad-gvidanto Nduantoni Ngangu estis feliĉa renkonti aron da novaj vizaĝoj en la manĝa, trinka kaj danca festo de la klubo Stelaro en Kinshasa. (Stelaro) ★

## Plua apogo en EP

Responde al letero de la hispana aktivulo Andrés Martín González, la nova prezidanto de Eŭropa Parlamento, José María Gil-Robles, skribis iom favore pri Esperanto. Nun ankaŭ Gil-Robles aperas sur la listo kiun Germain Pirlot tenas ĝisdata pri la eŭroparlamentanoj diversgrade favorantaj la uzon de Esperanto en Eŭropa Unio (vd. feb., p. 23).

## Por ke via vojaĝo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia.

**Al Aŭstralio fluge ĉirkaŭ la mondo por 3190 guldenoj!**

Por tiuj kiuj volas ĉirkaŭflugi la terglobon okaze de la kongresvojaĝo, UEA ofertas flugaranĝojn kiuj ebligas viziti, interalie, la kalifornian Esperantujon, antaŭ- kaj post-kongresojn en Nov-Zelando aŭ/kaj Aŭstralio.

1. **Ĉirkaŭmonda flugo**: *Amsterdamo–Los-Anĝeleso–Aŭklando–Sidnejo–Adelajdo–Sidnejo–Singapuro–Amsterdamo.* ***Prezo: 3350 gld.*** Eventuale necesas tranokto en Los-Anĝeleso (ĉ. 95 gld.). Se oni volas inkluzivi San-Franciskon, eblas aĉeti ir-revenan bileton *Los-Anĝeleso–San-Francisko*, aŭ je 195 aŭ je 450 gld.
2. **La Indonezia**: *Amsterdamo–Los-Anĝeleso–Sidnejo–Denpasar–Amsterdamo.* ***Prezo: 3190 gld.*** Necesas aldoni la flugojn Sidnejo–Adelajdo–Sidnejo, kiuj kostas kromajn 560 gld.
3. **La Amerika**: *Amsterdamo–San-Francisko (aŭ Los-Anĝeleso)–Aŭklando–Melburno–Adelajdo–Sidnejo–Los-Anĝeleso/San Francisko–Amsterdamo.* ***Prezo: 3490 gld.*** Tranokto revene en Los-Anĝeleso: ĉ. 95 gld.
4. **La Monda Naviganto**: ĝi kombinas flugojn de 9 kompanioj, ebligante 6 haltojn kaj 3 enlandajn flugojn en Aŭstralio, laŭ vere vasta elekto. **Prezo** (depende de la ekira flughaveno kaj de la itinero): **de 4400 ĝis 4800 gld.**

La prezoj de ĉiuj kvar ofertoj povas iom varii depende de la itinero, datoj kaj aliaj detaloj. En Singapuro kaj Aŭklando pagendas krome negrandaj flughavenaj impostoj. Principe eblas ankaŭ aliaj kombinoj. Interesatoj kontaktu la CO.


AKADEMIO DE ESPERANTO

# Enketo pri landaj institutoj

**Kiel deklarite en tiu ĉi rubriko (jul.-aŭg. '96, p. 128), YAMASAKI Seikô, estro de la Komisiono pri Landaj Institutoj, difinis kiel ties unuan tagorderon la trovadon de faktoj, kaj redaktis ĉi-cele enketilon.**

La enketilo estis dissendita zorge de la Centra Oficejo de UEA al ties aliĝintaj landaj asocioj. Komence de januaro, mi submetis la rezulton al la prezidanto de la Akademio. Oficiala pritrakto estos decidita de la Estraro. Dume mi raportos pri ĝi neoficiale.

La demandoj estis:

1. Kiu(j) lingva(j) instituto(j) pri Esperanto troviĝas en via lando?
2. Ĉu ili apartenas al via organizo, aŭ estas sendependaj?
3. Kiaj estas la funkcioj de tiu(j) lingva(j) instituto(j)?
4. Ĉu oni okazigas lingvajn ekzamenojn? Se jes, kiu prizorgas ilin? Ĉu vi mem aŭ la institutoj?
5. Kia estas via rilato kun ILEI?
6. Kia estas la maniero elekti la membrojn de via(j) lingva(j) instituto(j)?
7. Ĉu tiuj institutoj havas kontaktojn kun ne-Esperantaj instancoj en via lando (ekz. akademiaj aŭ registaraj)? Se jes, kun kiuj?
8. Ĉu ili havas kontaktojn kun internaciaj Esperanto-organizoj? Se jes, kun kiuj?
9. Ĉu ili havas regulan publikigaĵon aŭ regule aperigas informojn en iu revuo? En kiu?

Kelkaj kolegoj en la Akademio, trovinte kopion de la enketilo suplemente al cirkulero de la Prezidanto, preterdeve respondis al ĝi, tre enhavoriĉe. Strange, tiuj asocioj el kies lando respondis akademiano, silentis, kvazaŭ komisiinte la taskon al tiu. Impresis ke asocioj en eks-socialismaj kaj triamondaj landoj konscience plenigis la formularon.

Kolektiĝis sufiĉe da respondoj – el 20 landoj —, el kiuj 8 venis ret-poŝte. La listo montras la varian organizitecon de diverslandaj movadaj instancoj kaj povas servi kiel ia mezurilo. Montriĝis ke unuopaj landoj apenaŭ havas apartajn lingvajn institutojn, krom Svislando, Germanio, Francio kaj Italio. Preskaŭ ĉie landa asocio mem prizorgas tiajn funkciojn. En iuj kazoj paralele — supozeble kunlabore — funkcias aliaj organizoj, kiel ekz. landa sekcio de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj aŭ de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Ekzistas neniu instituto de akademieca karaktero. En iuj landoj, mi aŭdas, troviĝas lingva komitato sine de la landa asocio, sed nenio estis raportita pri ili.

Al la demando pri kontaktoj kun ne-Esperantaj (lingvaj) instancoj, la respondo estis negativa krom pri Ĉinio kaj Serbio — klarigeble per ilia socialisma ŝtata reĝimo. Tio montras ke la Esperanta komunumo loĝas periferie de la kulturaj strukturoj de siaj landoj.

Iom neatendita estis la demokratieco de la maniero elekti anojn de tiaj institutoj: tipa estas la franca, kies membroj estas nomumitaj 4 de Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 de SAT-Amikaro, kaj 3 alelektitaj (la proceduro ne estis priskribita).

Unu el la plej gravaj funkcioj de landaj institutoj devus esti administrado de ekzamenoj, kampo en kiu internaci-skale modele agadas ILEI. Por eviti duobliĝon de taskoj, la Akademio pli bone ne tretu la terenon de ILEI, precipe ĉar la interrilatoj inter tiu ĉi kaj UEA lasas nenion por deziri pli. La Akademio povus helpi en la ellaboro de la enhavo de la ekzamenoj. (Ŝajnas ke la Baza Radikaro Oficiala ja helpis.)

Por proksimigi la Akademion al la publiko, la Komisiono devas prizorgi la rilatojn ne nur kun la landaj institutoj (subkomprenite: lingvaj), sed ankaŭ kun la landaj asocioj mem. Tamen, tio ĉi jam estas bone farata de prof. Wandel en lia kvalito de UEA-estrarano pri faka kaj scienca agado. (Tiu ĉi paĝo mem demonstras tion, kaj iuj eroj de la enketo estis fakte sugestitaj de li.)

La enketo servas, kiel mi komence deklaris, por fakto-trovado. Ellaboro de programo komenciĝos nun. La landaj asocioj ankoraŭ ne respondintaj bonvolu reagi; la enketo restas plu malferma.

*YAMASAKI Seikô (Japanio)*

## Praga Manifesto

Ĝis redaktofino la nombro de subskriboj al la Praga Manifesto kreskis al 5738.

La Informa Fako daŭre disponigas diverslingvajn tradukojn laŭ peto. Elektronikaj variantoj en pluraj lingvoj estas legeblaj en la TTT-paĝo de Sveda E-Federacio: http://www.esperanto.se/.

RADIO

# Rekorda korespondemo ĉe Pola Radio

En la pasinta jaro pli ol triono de la korespondaĵoj adresitaj al unu el la dek fremdlingvaj redakcioj de Pola Radio venis al la Esperanto-redakcio: ĝi ricevis 2548 korespondaĵojn, pli ol iu ajn alia fremdlingva fako. Laŭ la statistiko de aŭskult-raportoj, la E-redakcio (5083) estis la dua post la germana. Tiu rezulto estas dankebla al bona kunlaborado kun la aŭskultantoj, subteno de Amikaro de Esperanto en Radio (AERA) kaj al la hejmpaĝoj de la E-elsendoj, prizorgataj de PEJNO Simono (http://ourworld.compuserve.com/homepages/simono/polrad.htm).

La 4-an de aprilo, kiam la E-elsendoj de Pola Radio fariĝos 38 jarojn aĝaj, oni anoncos la rezultojn de literatura kvizo kun pli ol 100 premioj. La demandoj estas: Kiu romano de la pola verkisto Bolesław Prus temas pri la vivo en la antikva Egiptio? Kiu tradukis ĝin en Esperanton? Kaj en vian lingvon? Kion vi opinias pri la enhavo de la romano? Por partopreni sufiĉas respondi al la unua demando. Skribu antaŭ la fino de marto al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Skrytka 46, PL-00-977 Warszawa, Pollando; ☏+48/22/645-59-17; aŭ 59-19; 🖳pettyn@radio.com.pl.

*Andrzej Pettyn*
*(Pola Radio)*




FAKA AGADO

# UEA kaj FA-j: Reciproka helpo

**Pasintjare vi povis plurfoje legi (jun., p. 103 kaj 114, sep., p. 151) pri kelkaj novaj servoj proponataj de UEA al la fakaj asocioj (FA-j).**

Ekzemple, dum la Praga kongreso FA-j povis prezenti sin kaj interŝanĝi spertojn en speciala faka forumo kaj utiligi "fakan giĉeton". Ambaŭ servoj bone funkciis kaj estos denove disponeblaj en Adelajdo.

Alia tia servo, kiu lastatempe produktas interesajn rezultojn, estas helpo al FA-j ligi kontaktojn kun internaciaj organizoj kiuj okupiĝas pri la sama fako. Kadre de sia ekstera faka agado, UEA instigis kontaktojn inter Akademio Internacia de la Sciencoj kaj du neregistaraj organizoj — Internacia Asocio de Universitatoj (IAU) kaj Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Lekciistoj (IAUPL). Lastatempe AIS estis akceptita al IAUPL, kaj ĝi plu interŝanĝas informojn kun IAU, kiu konsideras akcepti AIS kiel membron ĉi-jare.

Kaj kiel la fakaj asocioj helpu al UEA? Certe, ili pligrandigu sian membraron kaj intensigu sian agadon. Sed, krome, ili klopodu plifortigi sian pozicion sine de la internacia komunumo de samtemaj fak-organizoj (precipe la grandaj ne-registaraj organizoj en rilatoj kun Unesko), iniciatu tie kontaktojn kaj informadu pri la utileco de Esperanto. Ekzemple Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj povas kontakti organizojn kiel Edukado Internacia kaj Monda Konfederacio de Instruistoj, Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio — Internacian Federacion de Ĵurnalistoj, kaj Rondo Familia — Internacian Union de Familiaj Organizoj. UEA pretas esplori kaj informi pri eblaj kontaktoj kaj eĉ iniciati ilin, kiel okazis inter AIS unuflanke kaj IAU kaj IAUPL aliflanke. Jen kiel, per plifortiĝo interna kaj agado alekstera FA-j povos kontribui al la sukceso de la lanĉota UEA-iniciato Kampanjo 2000 por Nova Internacia Lingva Ordo.

*Amri Wandel*
*Estrarano pri faka agado*

# KSM reprosperas

Koresponda Servo Mondskala, unu el la plej malnovaj servoj de UEA (KSM, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio) povas denove fieri, post jaroj de malkresko, pri solida altiĝo de la nombro de korespond-petoj el la tuta mondo. Ŝajnas ke la populariĝo de komputilaj retoj ne forigas la plezuron skribi kaj ricevi leterojn sur papero. Post ĉ. po 400 petleteroj ĉiujaraj en 1993-95, KSM administris en 1996 jam 579 petojn de korespondemuloj. La plej multaj venis el Okcidenta Eŭropo (183), Brazilo (124), eks-Sovetio (82) kaj Afriko (75). Kompare al 1995, plej multe kreskis la petoj el Brazilo (de 69 al 124), Francio (de 76 al 110), Rusio (de 10 al 48), Kenjo kaj Madagaskaro (ambaŭ de 1 al 14), kaj Kubo (de 3 al 20). Intereso tamen preskaŭ mankas en Azio (21), Nord-Ameriko (9) kaj tute forestas en Oceanio (0). Ofta reklamado en la eldonaĵoj de UEA kaj en aliaj revuoj, same kiel mencioj en Pola Radio, kontribuis al la daŭriginda sukceso de KSM. ★

# Influo



*Por plibonigi la fluon de informoj pri informado* **Numero 13**



*Sekvas numero de* Influo *en kiu mankas longaj "teoriaj" artikoloj, sed en kiu des pli abundas etaj raportoj pri diverskampa, ĉiuloka agado. Mi esperas ke tio signifas ne malpli da pripensado, sed simple pli da agado en Esperantujo. Mi ĝojas raporti ke pluraj homoj rekte sendis al mi siajn kontribuaĵojn per retpoŝto; tiu nombro espereble grandiĝos iom post iom, ĉar tiel oni povas disvastigi la novaĵojn plej rapide.*

*Geoffrey Greatrex*

## aplikado

**Interretaj paĝoj**

La hispana sekcio de SAT nun havas propran TTT-paĝaron, kun klarigoj pri la lingvo en kaj la angla kaj la hispana. Ĝia adreso estas http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/espe.html. (Jesuo de las Heras)

**Akademia vizito**

En frua februaro, profesoro Geraldo Mattos, lingvisto antaŭe ĉe la universitato de Paraná (Brazilo), pasigis du semajnojn en Britio. Lian vojaĝon aranĝis kaj pagis *British Council*, organizaĵo kiu ĝenerale apogas la anglan lingvon. La celoj de la studvizito de prof. Mattos estis enketi pri lingvistikaj esploroj en Britio kaj fari siajn proprajn esplorojn pri la prononcmanieroj de britaj esperantistoj, el kiuj plurajn li renkontis.

# Brazila rebat-servo kreas respekton por Esperanto

Fine de aŭgusto, Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO, Caixa Postal 1097, Campinas-SP, 13001-970; ☐kultura@turing.unicamp.br) ekfunkciigis agadon certe ne originalan, sed de kelkaj jaroj ne plu ekzistantan en Brazilo: sisteme kunordigitan rebatadon al gazetaraj artikoloj.

Profitante el la sperto pri sukcesa rebatado en loka ĵurnalo, la nova teamo ĉe la estraro de BEJO decidis krei servon kiu atingos la tutan landon. Sub la nomo Rebato-Servo ĝi kolektas informojn pri artikoloj kiuj rekte aŭ nerekte rilatas al Esperanto, aparte pri tiuj kiuj misprezentas al la publiko niajn konceptojn kaj la lingvoproblemon. En malpli ol 24 horoj produktiĝas cirkulero kiu resumas la artikolon, transskribas la plej tiklajn partojn, kaj raportas pri la atingoj de la ĵusaj rebatadoj.

La unuaj du cirkuleroj sendiĝis al 150 homoj tra la lando. Post kvin cirkuleroj en dek semajnoj, petis definitivan aliĝon sufiĉe alta nombro: nuntempe enestas la liston ĉirkaŭ 60 homoj; kvardeko ricevas la materialojn per poŝto kaj ĉirkaŭ 20 perrete. Tio signifas duoblan laboron: komposti la paperan cirkuleron kaj poste igi ĝin pura ASCII-dosiero por sendado tra la reto. Krome ĉiam kreiĝas tria varianto, nome la tradukita versio por sendado al la internacia retlisto "rebato-L" (rebato-l@netcom.com), kio ĉiam postulas flankajn klarigojn pri la kunteksto.

La organizantojn ĝojigas la nemalhavebla partopreno de aliĝintaj aktivuloj, el plej diversaj aĝotavoloj, sen kiuj la tuta laboro ne estigus rezultojn. Multaj el ili eĉ sendas kopie al la Servo siajn rebat-leterojn, trafajn, originalajn kaj variajn. Tio kaj la partopreno de eksterlandanoj en niaj kampanjoj pozitive efikis jam en la unuaj spertoj: ekonomia revuo naciskale influa (200 mil ekz.), post prikomputila artikolo kiu faris stultajn aludojn al Esperanto, publikigis dulingvan leteron sur duono de paĝo en posta numero; en la sekva, aperis noto kun Esperanta titolo "Pardonu nin", per kiu la redaktoroj ĝustigis la asertojn ke Esperanto estas frenezaĵo kaj volas anstataŭigi ĉiujn aliajn lingvojn, kaj bedaŭris "la ĉagrenon senvole kaŭzitan al legantoj, kie ajn de Alasko, tra Taubaté [Brazilo], ĝis Norvegio". Erarkonfeso neofta en la brazila gazetaro. Kontraŭ kverelo kreita de propagandisto de Interlingua rezultis, per la multnombra agado de rebatanoj, almenaŭ unu tuta paĝo de artikoloj de esperantistoj en ĵurnalo de nordorienta Brazilo.

La Servo bezonas malmulte da mono por kopiado kaj dissendado, kaj al la kostoj kontribuas per libervole sendataj poŝtmarkoj la aliĝintoj mem. Montriĝas ke per tiu sistemo eblas havi sufiĉe grandan senpagan spacon en gazetoj, kion oni apenaŭ atingus se oni mem proponus artikolon prezentantan Esperanton. Tial oni jam serĉe pridiskutis ĉu ne indas ke duono de la rebatanaro produktu fuŝartikolojn, por ke la alia duono reagu!

La adreso por informado pri artikoloj kaj por aliĝo estas: Rebato-Servo de BEJO, p/a J. Piton, Av. João Batista M. do Canto, 257/J2, Campinas–SP, 13031-210, Brazilo; ℻+55 19 232-12-12; ☐kultura@turing.unicamp.br.

***James Rezende Piton (Brazilo)***

**Redaktoro:** Geoffrey Greatrex, The Highlands, Great Doward, Symonds Yat, Herefordshire, Britio HR9 6DY; ☐greatrexgb@cardiff.ac.uk **Informa Fako de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 10 436 1044; ℻+31 10 436 1751; ☐uea@inter.nl.net

# publika agado

**Germanio**
La kvaran fojon E-Ligo Berlin organizis standon, kun 14 helpantoj, en Expolingua (21-24 novembro, Berlino), kies organizantoj favore fakturis por la standloka spaco. Akompanan prelegon de Detlev Blanke aŭskultis 15 homoj. (*Berlina Informilo*)

**Belgio**
En la nova libro *Door God bij Europa verwekt* ("Generita de Dio kun Eŭropo"), la konata nederlanda verkisto Benno Barnard, vivanta nun en Belgio, parolas i.a. pri la iama Esperanto-ŝtato Mauresnet. Reprezentanto de la eldongrupo Veen dum unu horo prelegis pri tiu libro en la flandra librofoiro, okazinta en oktobro. Dum la radioprezento de la libro ĉe flandra tutlanda stacio estis mencio pri la "Esperanto-ŝtato de Mauresnet".

**Italio**
La Roma E-cemtro Luigi Minnaja, kunlabore kun la libroservo de Itala E-Federacio, aranĝis standon ĉe la Roma lingva ekspozicio *Espolingua* (6-8 novembro). Inaŭguris la ekspozicion brila prelego de d-ro Romano Bolognesi (sekretario de Internacia Fervojista E-Federacio) pri la historio de la alfabetoj. (*L'Esperanto*)

**Malto**
Malta E-Societo la unuan fojon reprezentiĝis en la Malta Librofoiro (La Valletta, 8-10 novembro) kaj aperigis paĝon da informoj en ties katalogo. Post la evento la prezidanto de MES, d-ro Carmel Mallia, donis du intervjuojn, al la televido kaj al la registara radio. (Carmel Mallia)

**Portugalio**
La semajnfinon de 24-26 oktobro, Portugala E-Asocio jam la kvaran fojon partoprenis en Lisbono la ekspozicion "pri lingvoj kaj kulturoj", *Expolingua*, kiu ĉi-foje proponis al PEA senpagan spacon. (En antaŭaj fojoj la samo kostis 200-300 mil eskudojn, t.e. 2200-3300 gld.) Deĵorantoj Antonio Martins, Faria de Bastos, Gonçalo Neves k.a. disdonis centojn da faldfolioj en la ekspozicio, kies cetero prezentiĝis kiel komercejo por lingvolernejoj kaj eldonejoj pri la angla kaj la franca. (*Nia Bulteno*)

**Kroatio**
La Komerca Ĉambro de Zagrebo invitis malgrandajn eldonejojn senpage ekspozicii maksimume po tri eldonaĵojn ĉe komuna budo en la ekspozicio *Interliber* de la Zagreba foiro, komence de novembro. La inviton akceptis Kroata Esperantista Unuiĝo kaj Zagreba Esperanto-Ligo, kiuj ambaŭ prezentis gravajn eldonaĵojn al la vizitantoj. (Marija Belošević, ⌨mbelosev@public.srce.hr)

## Kebekio jesas al *Esperanto hodiaŭ*

Dum lastatempa kunsido, la estraro de la Esperanto-Societo Kebekia aprobis la ideon pri nova komuna bulteno, esprimitan en *Influo* [jul., p. 131]. Ni pretas ŝanĝi la aperritmon kaj enhavon de nia bulteno por kongrui kun la fondota informilo. Nia asocio konsistas el 120-150 membroj, el kiuj eble la duono estas ankaŭ membroj de Kanada Esperanto-Asocio; laŭstatute, nur tiuj estas aligitaj membroj de UEA. (Sylvain Auclair, vicprezidanto de ESK)

**Francio**
Esperanto ĉeestis per eĉ du budoj en *Expolangues*, la Pariza ekspozicio de prilingvaj servoj (29 januaro - 2 februaro): unu de Unuiĝo Franca por Esperanto kaj alia de Junulara E-ista Franca Organizo, kiu eldonis ĉi-okaze modernan, buntan faldfolion. La 31-a de jan., en la plej spektata vespera horo, la tutlanda telavid-kanalo France 2 finis sian raporton pri *Expolangues* per intervjueto pri Esperanto: la aktivulo Gaston Riera staris antaŭ la JEFO-budo, ĉe kiu videblis kelkaj el la ĉ. 25 alternaj deĵorantoj, en nove dezajnita T-ĉemizo. (Philippe Berizzi, ⌨pberizzi@pratique.fr; Renée Triolle)




**Rusio**
En la Moskva surdisketa revuo *Spectrofon*, por uzantoj de hejma komputilo ZX SPECTRUM (n-ro 17, februaro 1996), aperis propaganda priesperanta programo de I. Simonov, "Kio estas Esperanto: informo por scivolemaj kaj praktikemaj homoj". La modesta malmoderna komputilo ZX SPECTRUM jam delonge estas forgesita en okcidentaj landoj, sed en eks-Sovetio ĝi ankoraŭ havas multajn uzantojn. La programo enhavas la partojn "Kion povas doni al vi Esperanto", "Kiel fariĝi esperantisto", "E-movado hieraŭ kaj hodiaŭ", "Esperanto kaj komputiloj?" kaj aliajn. En la programo estas mallonga skizo de la Esperanta gramatiko kaj listoj de rusiaj urbaj E-kluboj, asocioj kaj internaciaj E-organizoj. La eldonkvanto de *Spectrofon* estas 5 mil ekzempleroj. (I. Simonov, ⌨vas@oso.kreml.nnov.ru).

**Estonio**
En oktobro E-Instituto de Estonio ekspoziciis la kvaran fojon, en la Centra Biblioteko de la ĉefurbo Tallinn. Unu el la tri vitrinoj donis komparan superrigardon pri la Esperantaj kaj latinlingvaj literaturo kaj lernolibroj. (*Informoj de E-Asocio de Estonio*)

**Nederlando**
En la sino de la asocio Esperanto Nederland fondiĝis kvarpersona komisiono pri informado, sub la kunordigo de asocia estrano Wim Jansen. Laŭ li, la ŝancoj por informado nun "estas unikaj: neniam antaŭe la nederlanda Esperanto-movado havis la okazon prezenti sin tiel unuece. Neniam antaŭe la internacia lingvoproblemo manifestis sin tiel klare kiel nun en la Eŭropa Unio. Neniam pli ol nun, la nederlandanoj tiom parolis pri la minacata pozicio de sia lingvo en la eŭropa medio. Aliflanke, la informiteco pri la lingvoproblemo estas tre mankhava kaj la kono pri Esperanto estas pli limigita ol iam antaŭe." Ĉu diagnozo valida por aliaj EU-landoj? Konsekvence, la komisiono celas "vastan diskonigon de la nomo kaj enhavo de Esperanto", kaj jam pretigis laborplanon. (*FEN-X*)

**Ĉeĥio**
Ĉeĥa E-Asocio havas dumembran komisionon por stimuli esperantistojn verki artikolojn por la gazetaro kaj registri ilin. Kunordigas Drahomir Kočvara (Hulvácká 18, CZ-70300 Ostrava-Zábřeh).

# interreto

**50 000 vizitoj en unu jaro**
Post unujara funkciado, la 5-an de februaro la kalkulilo sur la Interretaj paĝoj de Sveda Esperanto-Federacio (www.esperanto.se) registris la 50-milan viziton. En unu jaro la nombro de vizitoj kreskis de po kelkaj tage al ĉiutage 500-600.

La TTT-informejo de SEF enhavas pli ol 1500 dosierojn (tekstojn kaj ilustraĵojn), kiuj okupas pli ol 10 megabajtojn da spaco. Ĝi abunde informas pri Esperanto, inkluzive de Interreta kurso por svedoj, kaj funkcias ankaŭ kiel varbilo de novaj membroj, kiuj povas tuj plenigi retan aliĝilon.

Plejparto de la informoj estas svedlingvaj, ĉar SEF direktas sin unuavice al sveda publiko. Plej ofte oni vizitas "Kiosko", registron de ligiloj al 1800 gazetoj tra la tuta mondo (www.esperanto.se/kiosk/espindex.html). Ĝi estas speciale populara ĉe bibliotekoj kaj lernejaj klasoj kun multaj diverslandaj anoj. Serĉante gazetojn tra la mondo la vizitantoj ricevas, vole-nevole, instigon informiĝi pri Esperanto. (Franko Luin, ⌨franko@esperanto.se)

## amaskomunikiloj

**Germanio: Novaĵ-agentejo**

Artikolo kiun Frank Stocker, prezidanto de Germana E-Asocio (GEA), verkis por germanlingva numero de ties revuo *Esperanto aktuell* pri la ŝvaba dialekto, estis vaste diskonigita de la tutlanda novaĵ-agentejo dpa, kaj reaperis diversforme en multaj gazetoj de sud-okcidenta Germanio. Rezulte, multaj turnis sin al GEA por ekhavi la originalan artikolon, ĉar, kiel interesato skribis, "mi demandis ĉe pluraj gazet-vendejoj, sed *Esperanto aktuell* bedaŭrinde nenie estis aĉetebla". (*Esperanto aktuell*)

**Serbio: Ĵurnalo**

La 3-an de januaro en *Politika Ekspres* aperis tutpaĝa artikolo pri Esperanto kaj la nuna aktivado de serbaj esperantistoj, surbaze de intervjuo kun Renato Petroviĉ, prezidanto de la E-societo Radomir Klajiĉ. Ilustra foto prezentas partoprenantojn de la Internacia Junulara Semajno en 1996. (Renato Petroviĉ, ☐e1novada@rcub.rcub.bg.ac.yu)

**Ĉeĥio: Gazeto**

La gazeto *Internet 4U* plurpaĝe intervjuis la posedanton de la firmao KAVA-PECH, Petr Chrdle, pri la aplikoj de Esperanto en Interreto. (*Starto*)

**Kroatio: Radio**

Kroata Esperantista Unuiĝo regule dissendas E-novaĵojn al la naciaj amas-informiloj. Lastatempe informo pri la apero de la kalendaro "La Jaro" de *Monato* vekis intereson, ĉar ĝi mencias tri naciajn kroatajn festotagojn. La sekretario de KEU, Marija Belošević, estis invitita al la nacia radio por 20-minuta babilado pri la kalendaro kaj aliaj E-temoj. (Marija Belošević)

Ĉe la sama radio, la 15-an de februaro, oni ne nur parolis pri Esperanto, sed ankaŭ disaŭdigis E-muzikon. Kadre de la reklamkampanjo por la disko *Volumo 2* de *Vinilkosmo-kompil'* (vd. feb., p. 31), Belošević parolis en 20-minuta matena programo pri la disko kaj la eldoninto, la asocio Eurokka. Sonis la kantoj "Vivo duras sed vi molas" de Martin Wiese kaj "Teren rigardu" de Rémy Walter.

## kulturo

**Desegnokonkurso**

Por internacia ekspozicio titolita "Mia novjara mesaĝo" atingis la organizanton, Kroatan Esperantistan Unuiĝon, iom malpli ol 400 desegnaĵoj el diversaj partoj de la mondo (ekz. Albanio, Aŭstralio, Belgio, Britio, Italio, Niĝerio, Rusio kaj Usono). Komence de la jaro, parto de la kolektitaj desegnaĵoj estis ekspoziciata en pluraj kroataj urboj. La ekspozicion plurfoje dum la kristnaskaj festotagoj menciis la kroata radio. Ankaŭ taggazetoj prezentis ĝin. (M. Belošević)

**Usono: Gazeto**

La loka gazeto de la urbo Elkhart (40 mil loĝantoj) en Indianio, *The Truth*, aperigis la 13-an de oktobro longan artikolon pri bibliotekisto Roger Blaine, "Roger kampanjas por plu vivigi 'plej facilan' lingvon".

**Germanio: Magazino**


La dumonata magazino *Punkt*, eldonata de la Berlina senato, publikigis en sia septembra-oktobra numero artikolon de Reinhard Hoheisel, lingva kunordiganto de la germana por la Eŭropa Komisiono, pri "Multlingveco kaj komunikado en la organoj de la Eŭropa Komisiono". Post prezento de la situacio, Hoheisel konkludas nebule: "Komunikado interne de la EU-oficejoj nur tiam eblas, kiam toleremo, respekto kaj estimo rilate al aliulo kaj la preteco lerni (ankaŭ lingvojn) estas memkompreneblaj. La ĉiutaga sperto en la oficejoj de la Eŭropa Unio montras: Tio eblas." La teksto aperas sinsekve en la germana kaj Esperanto. Por *Punkt* ne estas malkutime publikigi fremdlingvajn tekstojn: ĉi-foje, pro la temo, la redakcio havis la ideon mendi Esperantan tradukon de Berlina E-Ligo, sen aparta intenco reklami nian lingvon. (Ina Tautorat)

**Estonio: Gazeto**

La 12-an de novembro la distrikta gazeto *Harjumaa* aperigis intervjuon kun Helgi Hromova pri E-o kiel bazo por lerni aliajn lingvojn; samnumere Hromova artikolis pri la Praga UK. (*Informoj de E-Asocio de Estonio*)

**Francio: Radio**

Antaŭ nelonge elsendo de la franca radio France Inter, pri la vasta temo "konstruado de Eŭropo", ricevis multajn mesaĝojn de esperantistoj, tiom ke la prezentisto eĉ suspektis antaŭ-akordiĝon. Kvankam la elsendo ne estis tute malfavora al Esperanto, ĝi konkludis ke Esperanto ne apartenas al iu lando, sekve ĝi povas esti konsiderata eĉ malpli ol regionaj lingvoj. (*Le Travailleur Espérantiste*)




**Grafikaĵo el la E-lingva artikolo en *Punkt* (vd. "Germanio: Magazino"), pri la kresko de traduk-direktoj (vertikale) laŭ la kresko de la oficialaj lingvoj en EU (horizontale).**

**Finnlando: Revuo**

La kvaronjara revuo *STV Securitas*, dekmil-ekzemplera magazino por klientoj kaj dungitoj de la internacie aktiva firmao Securitas, aperigis en sia n-ro 1996/4 intervjuon kun noktogardisto Markku Saastamoinen, vicdelegito de UEA en Ylöjärvi apud Tampereo, kun la titolo "Esperanto ĉarmis [min]". La tekston ilustris koloraj fotoj de Saastamoinen kaj de E-libroj.

➲



**Ne plu cerbumu por publikigi rutinan anoncon en viaj amaskomunikiloj!**

***Gvidlibro por loka informado***

**estis elpensita por helpi vin.**

**Mendu ĝin ĉe la Libroservo de UEA.**

**Prezo 7.50 ekuoj (16,50 gld.). Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.**

## amaskomunikiloj

**Francio: Gazeto**

Sekve de artikolo de la lingvisto Claude Hagège en la oficiala organo de la sindikato CGT, *La Vie Ouvrière*, aperis tuta paĝo da reagoj de esperantistoj en la decembra numero. (Renée Triolle)

**Rusio: Konkurso**

Aleksandr Melnikov, delegito en Rostov-na-Donu, gajnis premion en konkurso por la plej interesa rakonto pri eksterlanda aventuro. En senpage distribuata reklam-gazeto (240 mil ekzempleroj) publikiĝis liaj raportaĵoj el Aŭstralio, Japanio kaj Nederlando, kun emfazo pri Esperanto, la lingvo uzata porkaj dumvojaĝe. (Aleksandr Melnikov)

**Bosnio: Magazino**

En la populara semajna magazino *Svijet*, eldonata en Sarajevo, la 19-an de decembro aperis senprecedence ampleksa, 3-paĝa intervjuo kun Senad Čolić, prezidanto de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, pri la dummilita kaj nuna agado de la Ligo, la lingva situacio en la mondo, interlingvistiko kaj la vivo de la E-lingva komunumo. (ELBiH)

**Rumanio: Televido**

En tagmezo sabata, la 28-an de septembro, la televido Europa Nova (Timişoara) elsendis 75-minutan intervjuon pri la Esperantaj ideo kaj movado. Al ĉ. 30 demandoj respondis prof. d-ro Ignat F. Bociort, honora prezidanto de Rumana E-Asocio, REA-sekretario Florica Popa, kaj REA-prezidanto Dorin Hehn. (Florica Popa)

**Irano: Gazetaro**

*Hamŝahri*, Teherana ĵurnalo kun la plej granda eldonkvanto en Irano, aperigis en novembro la artikolon "Esperantistoj ankoraŭ esperas por disvastigo de Esperanto". La ŝtata ĵurnalo *Et-te-la-at* kaj ties sciencvulgariga monata magazino regule publikigas E-rilatajn materialojn. (Reza Torabi)

**Dagestano: Televido, gazeto**

En la 30-minuta elsendo "El la foraj vojaĝoj" de la Dagestana Ŝtata Televido, la 4-an de januaro, Abduraĥman Junusov rakontis pri sia 2-jara staĝado ĉe *Eventoj* en Hungario kaj *Monato* en Belgio. Dum la elsendo li montris plurajn E-aĵojn, fotojn, kaj videofilmerojn pri internaciaj rennkontiĝoj.

La plej populara dagestana gazeto *Novoje delo* (30 mil ekz.) la 21-an de februaro publikigis artikolon "En Hungario kaj Dagestano oni parolas Esperanton", en kiu estis intervjuataj la nova (dagestana) prezidanto de Rusia E-ista Unio, Abduraĥman Junusov, kaj la ambasadoro de Hungario en Rusio, György Nanovfszky. (Abduraĥman Junusov)

**Ukrainio: Televido, radio**

La loka televido de Odeso prezentis la E-klubon Verdaĵo dufoje, per 3-minuta (25 novembro) kaj duonhora (11 decembro) programoj. La klubo reaperis en 5-minuta elsendo de la loka radio la 13-an de decembro. (*Ruslanda Esperantisto*)

## rimedoj/materialoj

**Belgio**

Didaktika panelo por lude demonstri bazajn E-regulojn, farita por skoltaj ĵamboreoj, estis multfoje uzata dum informborsoj en Belgio kaj Francio. Kelkaj E-klubestroj jam demandis ĉu la panelo estas aĉetebla en transportebla formato. Ĉar tio eblus nur se sufiĉe multaj kluboj interesiĝus, Arie Bouman (Driesdreef 8, BE-9030 Gent-Mariakerke, Belgio; ☎/🖷 +32/9/227-48-41) petas ke interesatoj lin kontaktu.

**Japanio: Nova simpla lernilo**

Eldoniĝis nova lernolibro de Esperanto por japanlingvanoj, *Elementa lernolibro de Esperanto*. Ĝi estas legebla sen vortaro, sisteme ordigita kaj facile komprenebla, kontentiganta la scivolemon de la legantoj per 400-paĝa amplekso en A5-formato. Ĝin verkis Huzimaki Ken'iti kaj eldonis Japana Esperanto-Instituto. (Informa Fako de E-societo en Numazu)




**Ne ĉi tiel aspektis la jara asembleo de Triesta E-Asocio. (Vd. "Rimedoj/materialoj: Italio/Slovenio".)**

**Usono: Senkosta telefonnumero**

En pluraj landoj eblas uzi telefonnumeron per kiu oni senkoste povas telefoni al iu firmao aŭ E-asocio. (Kompreneble la telefonado estas senkosta nur por la vokanto, la realajn kostojn al la telefona kompanio pagas la servo-luanta firmao mem.) La servo estas tre utila, ja ĝi instigas homojn senĝene telefoni, peti informojn ktp; ĝi utilas ankaŭ por la firmao (E-asocio), kiu tiel pli facile kaptas novajn klientojn.

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) ekde 1992 uzas tiun rimedon, kaj nun (danke al Ed Williger kaj Steve Belant) ĝi eĉ akiris bone memoreblan, simplan telefonnumeron: 800-ESPERANTO (800-377372686). La cifero 800 estas la prefikso por la "senpagaj" vokoj, kaj la ceteraj ciferoj respondas al surbutonaj literoj de la telefonaparato. La lastaj du ciferoj, responde al T kaj O, estas kromaj kaj ne formas parton de la efektiva numero, sed povas esti klavataj sen ĝeno al ties ĝusta funkciado. La numero validas nur usone, krom se oni havas portelefonan internacian kreditkarton. Ĉe telefonado, al la informpetanto respondas aŭtomato, petanta en la fino lasi la nomon kaj adreson, al kiuj ELNA sendas broŝurojn pri Esperanto kaj kvar novaĵleterojn dum la sekvaj 12 monatoj. Por la vokoj ELNA pagas po ĉ. 32 cendojn — sumon egalan al afranko de enlanda letero. Kutime alvenas ĉ. 15 vokoj semajne, sed post apero de ajna favora artikolo inundas vokoj dum iom da tempo. La nova numero estas publikigata (-enda) en ĉiuj nordamerikaj varbiloj, informiloj. (ELNA, 🖳elna@netcom.com)

**Italio/Slovenio**

La jara asembleo de Triesta E-Asocio (TEA), la 12-an de januaro, komenciĝis kun konsiderinda malfruo, sed pro kialo pozitiva: rezulte de mallonga gazetara komuniko dissendita, neanoncite aperis skipo de la nacia televido RAI-3 por filmi la eventon. TEA ricevis tiel plurminutan senpagan reklamon, plurfoje elsenditan en la plej spektataj horoj. Se juĝi laŭ la efiko de tiu TEA-komuniko, certe indas aĉeti la broŝuron *Gvidlibro por loka informado* de triestanoj Aldo Viotto kaj Elda Doerfler, kiu enhavas modelajn tekstojn por gazetaraj komunikoj (vd. reklamon sur p. 49). Okaze de la novjaraj festoj, Slovenia Esperanto-Ligo jam donacis ĉi tiun broŝuron al siaj lokaj grupoj.

Itala Esperanto-Junularo siaflanke realigis 62-paĝan itallingvan gvidlibreton pri siaj celoj kaj agadoj, pri respondoj al oftaj demandoj pri Esperanto, kaj pri diversaj gravaj sciindaĵoj movadaj, de Pasporta Servo al Premio Marelli, kiu subvencias vojaĝojn de italaj gejunuloj al Universalaj Kongresoj. (*La Eta Gazeto*)

**Nederlando**

Laŭ peto de la Centra Oficejo, kiu ofte devas respondi al inform- kaj intervju-petoj de nederlandaj ĵurnalistoj, la asocio Esperanto Nederland senpage disponigis al la CO 50 ekzemplerojn de sia ilustrita, 22-paĝa informbroŝuro *Esperanto, van taalproject tot levende taal* ("Esperanto, de lingvoprojekto al vivanta lingvo"), eldonita en 1996.

# Kalendaro 1997-98

**plurfoje**

**Esperanto-Klubo**, CZ-67401 Třebíč, Ĉeĥio

**Esperanto-Propaganda Asocio**, Oomoto, Ten'on-kyo, Kameoka-si, Kyoto-hu, Japanio 621; ☎+81/771/225-561; ⎙250-061; <100507.1652@compuserve.com>

**Esperanto – Regiona Societo**, Sobotské námestie 36, SK-05801 Poprad, Slovakio; ☎/⎙+421/92/32-419

**Esperanto-Stuttgart**, Dachtlerstr. 21, DE-70499 Stuttgart, Germanio; ☎+49/711/138-89-80; ⎙138-89-82

**Grésillon: Kultura Esperanto-Domo**, Grésillon, FR-49150 Baugé, Francio; ☎+33/2/41-89-10-34

**Hungaria E-Asocio**, Pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario; ☎+36/1/268-03-06; ⎙268-03-31; <esperantohea@mail.c3.hu>

**Kava-Pech**, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Praha), Ĉeĥio; ☎+420/2/991-22-01; ⎙991-21-26; <chrdle@kava-pech.cz>

**Kroata E-ista Unuiĝo**, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio; <mbelosev@public.srce.hr>

**Kultura Centro Esperantista**, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎/⎙+41/ 32/926-74-07

**La Kvinpetalo**, route de Civeaux, FR-86410 Bouresse, Francio; ☎+33/5/49-42-80-74

**Joanna Lewoc**, Senata Sekretario de AIS, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, DE-37077 Göttingen, Germanio

**Monda Turismo**, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando; ☎+48/52/415-744; ⎙460-082; <turismo@bydg.pdi.net>

**Orbis Pictus**, Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131Trieste, Italio; ☎+39/40/767-875

> **Interreto.** Daŭre aktualigata listo de ĉiuj konataj E-aranĝoj estas konsultebla ĉe la TTT-paĝoj www.hungary.net/esperanto/. Ĝi estas ankaŭ ricevebla per sendo de jena mesaĝo al <w3mail@gmd.de>: "get ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt". En papera versio ĝi aperas po monataj blokoj en la gazeto *Eventoj*.

**marto**

18-24: **Printempa Festivalo**, Budapeŝto, Hungario (Hungaria E-Asocio, adreso supre)

21-25: **4-a Mediteranea (Moda) Internacia Renkontiĝo** de Kroatia E-Ligo, Rovinj, Kroatio (Kroatia E-Junulara Asocio, Amruševa 5/I, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/481-01-52; <kamenski@cirus.dhz.hr>)

24-30: **Cseh-metoda E-kurso**, Prago-Brno, Ĉeĥio (Kava-Pech, adreso supre)

26-01 apr.: **21-a Internacia Junulara Festivalo**, Col di Nava (Imperia), Italio (Friedrich Schreiber, via dei Cordaroli 7, IT-34135 Trieste; ☎+39/40/422-607; ⎙763-128; <fulmo@ts.flashnet.it>; http://www.angelfire.com/co/Fulmotondro/IJF.html; temo: "Estonteco")

28-31: **Paska Renkontiĝo** de Nederlanda E-Junularo, Vught, Nederlando (David van Bezooijen, De Boogaert 28, NL-1901 GP Castricum; <bb3s@stud.frw.uva.nl>; ☎(Jasper Sprengers) +31/24/373-14-17; temo: "Antaŭjuĝoj")

28-03 apr.: **2-a Internacia Renkontiĝo de lernejanoj-e-istoj "Aprilaj Ridetoj"**, Odeso, Ukrainio (Tatjana V. Auderskaja, Korolenko 5-b, kv.26, UA-270100 Odessa; ⎙+7/380/482-52-28-05; <wildlife@paco.odessa.ua>)

28-04 apr.: **13-a Printempa Semajno Internacia kaj 3-a Printempa Lernejo Internacia**, Duderstadt, Harc-Montaro, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ⎙2641/978-666)




*2-a Hansa Esperanto-Tago kaj 5-a Baltmara Turisma Renkontiĝo, 1-4 majo, Germanio*

29-31: **52-a Kongreso de SAT-Amikaro**, Limoges, Francio (Isabelle Jacob, Pomarbo Les Monneries, FR-87200 Saint-Brice; ☎+33/5/55-03-54-76)

**aprilo**

01-25: **13-a Internacia Simpozio pri E-Turismo**, vojaĝo tra deko da landoj (Monda Turismo, adreso supre)

03-30: **E-Ekspozicio pri Komenio kaj Zamenhof**, Ĉeĥa Kultura Centro, Varsovio, Pollando (Ladislav Fiala, Nowickiego 3/20, PL-02112 Warszawa; ☎+48/22/222-346)

04-06: **Fromaĝa Semajnfino** de Junulara E-ista Franca Organizo, Grenoblo, Francio (Pascal Lécaille, B.P. 3019, FR-69394 Lyon Cedex 03; ☎/⎙+33/4/72-36-07-14; <pascal@zen.dedal.fr.net>)

04-06: **Junulara E-Renkonto**, Piliscsév, Hungario (Dávid Alko Golden, Damjanich u. 1/c, I. 8, HU-8200 Veszprém, ☎+36/88/424-339; <goldend@hal2000.hal.vein.hu>; temo: "Tradicioj")

04-06: **Kursa semajnfino**, bieno Njeguš, Kroatio (Orbis Pictus, adreso supre)

06-13: **Krozado sur Rejno kaj Mozelo**, de Kolonjo al Bernkastel, Germanio (Peter Parren, Rothenbachpark 44, NL-6063 NM, Vlodrop, Nederlando; ☎+31/43/455-14-36)

08-12: **Sed fine (kaj diable!) kio estas vortaro?**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; prelegas Michel Duc Goninaz)

11-13: **"Pri io aŭ nenio"**, amuza kunestado, Poprad, Slovakio (E-o – Regiona Societo, adreso supre)

11-13: **4-a ELTEKO**, internacia laborgrupo pri elektroniko, telematiko, komputiko, Rumbeck/Hameln, Germanio (Mauro Tauzzi, c/o Duhme, Friedensplatz 4, DE-35037 Marburg; ☎+49/6421/162-602; <duhme@stud-mailer.uni-marburg.de>; http://members.aol.com/wdherndon/ELTEKO.htm)

12-13: **17-a Renkontiĝo de Portugalaj E-istoj**, Barreiro, Portugalio (Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto 6, r/c A, PT-1500 Lisboa; ☎+351/1/714-13-59; ⎙793-39-24; <bacano@cc.fc.ul.pt>)

12-19: **Internacia Renkonto de Infanoj**, Grésillon, Francio (adreso supre)

15-19: **La vortkunmetado?...**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; instruas Georges Lagrange)

<u>19: **Malferma Tago de la Centra Oficejo**, Roterdamo, Nederlando (CO de UEA, adreso en la kolofono)</u>

19-20: **Perfektiga seminario por komencintoj, progresintoj, ekspertoj**, Hamburgo, Germanio (Hamburga Esperanto-Societo, Klaus-Groth-Str. 95, DE-20535 Hamburg; ☎/⎙+49/40/250-30-65)

19-20: **7-a Kongreso de Valencia E-Federacio**, Benidorm, Hispanio (José Miguel Bernabéu Egea, Plaza Pío XII, 1, 4°C, ES-03012 Alicante)

22-26: **2-a Internacia Studenta Scienca kaj Teknika Kongreso de Azi-Pacifikaj Landoj**, Vladivostoko, Rusio (FESTU, 10, Puŝkinskaja str. Vladivostok; ☎+7/4232/268-769; ⎙266-988; <espero@pub.marine.su>; laborlingvoj: angla, Esperanto, rusa)

24-27: **A-seminario por Cseh-instruistoj**, Triesto, Italio (Triesta E-Asocio, C.P. 601, IT-34100 Trieste; ☎/⎙+39/40/763-128; <aviotto@spin.it>; gvidas Katalin Smidéliusz)

26-27: **7-a Internacia Kurskunveno**, ĉe Kita Kjuŝu apud Hukuoka, Japanio (E-Propaganda Asocio, adreso supre)

26-27: **Sándor Szathmári (1897-1974): Lia vivo kaj verkaro**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; prelegas Ljubomir Trifonĉovski)

26-04 majo: **22-aj E-Tagoj de Bydgoszcz** kaj **Pola studsesio de AIS San-Marino**, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, resp. Lewoc, adresoj supre)

27: **Cseh-tago**, Rijeka, Kroatio (Orbis Pictus; kun ĉeesto de Katalin Smidéliusz)

27: **Trilanda Renkontiĝo**, Aachen, Germanio (Wolfgang Bienen, Eynattener Str. 56, DE-52064 Aachen; ☎+49/241/623-50; ⎙241/602-353; temo: "Esencaj aspektoj de la islama mondo")

27-04 majo: TEJO-seminario pri informado, Budapeŝto, Hungario (Nóra Csiszár, Erdődy Pálffy Tamás u. 25.V.16, HU-8100 Várpalota; <hallo372@ osiris.elte.hu>; temo: "Aŭdigi niajn voĉojn — junuloj kaj amaskomunikiloj")

**majo**

01-04: **2-a Hansa E-Tago** kaj **5-a Baltmara Turisma Renkontiĝo**, Stralsund, Germanio (Esperanto-Kijlo, Christian Darbellay, Kaiserstr. 43, DE-24143 Kiel; ☎/🖷+49/431/735-016)

01-04: **28-a Kataluna** kaj **1-a Transpirenea Kongreso de E-o**, Figueres, Katalunio (28-a Kataluna Kongreso de Esperanto, Apartat 290, ES-08200 Sabadell)

01-05: **4-a Krakova Festivalo de E-Kulturo**, Pollando (Grażyna Maszczyńska-Góra, ul. Armii Krajowej 2/14, PL-31-150 Kraków; ☎+48/12/375-390; temo: "E-o en la monda kulturo")

01-09: **Karpata Printempa E-ista Ripozo kaj Lernado** (PERLo), Karpatoj, Ukrainio (Irina Gonĉarova, Molodjoĵnaja 38-10, RU-143000 Moskva-Odincovo-2, Rusio +7/095/593-05-75; 🖷292-65-11 LOIEPL; <irina@tung.msk.su>)

02-04: **92-a Skota** kaj **81-a Brita Kongreso de E-o**, Perth, Skotlando (Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, Motherwell, Britio ML1 3AP; ☎+44/1698/263-199)

02-04: **Printempa E-ista Renkontiĝo en Alpaj Tatroj**, Poprad, Slovakio (E-o – Regiona Societo, adreso supre)

03-04: **Esperanto en praktiko**, ideo-borso, Bieno Njeguš, Kroatio (Orbis Pictus, adreso supre)

07-11: **Latvia Internacia Printempo**, Cēsis-Priekuļi, Latvio (Māra Timermane, Valdemāra iela 145/1-32, LV-1013 Rīga)

08-11: **Astronomio**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; instruas Patrick Lagrange)

10-13: **Esperanta Kultura Festivalo**, Aalen, Germanio (Esperanto-Stuttgart, adreso supre)

10-17: **49-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio**, Košice, Slovakio (Magdaléna Feifičová, A. Bernoláka 25/5, SK-01001 Žilina)

13-16: **Eŭropa Junulara Parlamento** (Esperanto-Stuttgart, adreso supre)

13-16: **Antaŭkongresa ekskursaro** (Esperanto-Stuttgart, adreso supre)

16-19: **Tria Eŭrop-Unia E-Kongreso**, Stutgarto, Germanio (Esperanto-Stuttgart, adreso supre)

17-19: **Pentekosta migrado**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

17-19: **14-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca E-Movado**, Budapeŝto, Hungario (Movilo, Nyírpalota út 107, HU-1157 Budapest; ☎+36/1/271-95-10; 🖷418-28-40)

17-20: **Tradukado**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Georges Lagrange)

19-23: **13-aj Flortagoj**, Tauberbischofsheim, Germanio (Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen)

22-24: **Printempa Kurskunveno**, Kameoka, Japanio (E-Propaganda Asocio, adreso supre)

24-30: **BEK-Kurso**, Rijeka, Kroatio (Orbis Pictus, adreso supre; laŭ metodo de Dennis Keefe instruas Višnja Branković)

24-31: **Junulara Renkontiĝo**, Vladivostoko, Rusio (Vladivostoka E-Klubo, OIAK, str. Svetlanskaja 50, RU-690600 Vladivostok; ☎/🖷+7/4232/220-715; <espero@pub.marine.su>)

26-30: **Ripoza Renkonto** kaj (30-03 jun.): **11-aj E-Tagoj**, Staszów, Pollando (Esperanto-Klubo, Parkowa 6, PL-28-200 Staszów; ☎Andrzej Sochacki +48/ 15/864-13-67)

27-02 jun.: **15-a Printempa E-Staĝo**, Agde, Francio (C.B.E., 9 rue Georges Picot, FR-34500 Béziers; ☎+33/4/67-31-13-18; senpaga por gejunuloj sub 25 jaroj kaj por eksterlandanoj)

30-01 jun.: **5-a Internacia Kultura Semajnfino**, Antverpeno, Belgio (Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; ☎+32/3/234-34-00; 🖷233-54-33; <fel@knooppunt.be>; temo: "Komunikado")

30-01 jun.: **Nord-Okcident-Regiona E-Kunveno**, Sidney, Brita Kolumbio, Kanado (Wally du Temple, 765 Braemar Avenue, Sidney, BC V8L 5G5; <dutemple@mail.IslandNet.com>)

31-01 jun.: **Unua kongreso de kroatiaj e-istoj**, Zagrebo, Kroatio (Kroatia E-Ligo, Amruševa 5/1, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/481-01-52)

31-01 jun.: **La platdiĉa lingvo**, seminario, Hamburg, Germanio (Hamburga Esperanto-Societo, Klaus-Groth-Str. 95, DE-20535 Hamburg; ☎/🖷+49/40/ 250-30-65)

31-08 jun.: **Unua rendevuo de E-aj internaciaj geedzaj paroj**, Poděbrady, Ĉeĥio (Ladislav Fiala, Nowickiego 3/ 20, PL-02112 Warszawa, Pollando; ☎+48/22/222-346; Frederiko Jeřábek, Fügnerova 28/18, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio)

**junio**

05-08: **9-a Alp-Adria E-Konferenco**, Crikvenica, Kroatio (Kroata E-ista Unuiĝo, adreso supre; temo: "Naturo – nia vivtrezorejo"; kun konkurso fota, desegna kaj literatura – limdato la 1-an de apr.)

06-08: **E-ista Renkonto de Dandong-a E-Asocio**, Dandong, Ĉinio (MA Fengchen, Zhigong Liaoyangyuan, CN-118003 Dandong; ☎+86/415/415-12-14)

06-08: **Unua Nordorienta Ĉina Kongreso**, Fushun, Ĉinio (WU Guojiang, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fushun, Liaoning; ☎+86/413/233-11-53; 🖷233-22-07)

09-15: **19-a Ĉebalta E-ista Printempo**, Mielno, Pollando (Filio de Pola E-Asocio en Koszalin, skr. poczt. 30, PL-75-016 Koszalin)

13-15: **Printempa Renkontiĝo** de E-Societo Kebekia, Sainte-Catherine-de-Hatley apud Sherbrooke, Kebekio, Kanado (E-Societo Kebekia, 6358-A rue de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado H2G 2R8; ☎+1/514/272-01-51; 🖷495-84-42; <mmaerten@cam.org>)

20-30: **E-somerlernejo** kun internaciaj UEA/ ILEI-ekzamenoj, Pula, Kroatio (prof. Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb; <mbelosev@public. srce.hr>)

20-30: **Internacia E-renkontiĝo Dagestano-97**, Maĥaĉkala, Dagestano, Rusio, surborde de Kaspia maro (Abduraĥman Junusov, p.k. 74, RU-367000 Maĥaĉkala, Dagestano, Rusio; ☎+7/8722/ 630-643; <root@eldaggu.dagestan. su>)

20-05 jul.: **Internacia Amika Renkonto**, kursoj por praktikantoj kaj lertuloj, Grésillon, Francio (adreso supre)

22-29: **FREŜO '97**, Ełk/Olsztyn, Pollando (Andrzej Gielert, ul. Murzynowskiego 22/27, PL-10-684 Olsztyn; ☎+48/89/ 428-898; 🖷533-47-60)

23-27: **3-a Internacia E-Semajno**, Tampereo, Finnlando (Jukka Laaksonen, Uudenkylänkuja 2 B 11, FI-33530 Tampere; ☎+358/3/255-47-24; <veli.



*28-a Somera kursaro ĉe Ŝtata Universitato de San-Francisko, 23 junio - 11 julio, Usono (supre: kursanoj de 1996, el Danio, Brazilo, Belizo, Kostariko, Meksiko, Usono, Kanado kaj Japanio)*

hamalainen@pp.kolumbus.fi>; instruas Atilio Orellana Rojas)

23-11 jul.: **28-a Somera kursaro,** San-Francisko, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, CA 94010-6710; ☎+1/415/342-17-96; instruas je kvar niveloj Grant Goodall, Derek Roff, Trevor Steele kaj Dorothy Sterner)

27-29: **55-a Norvega E-Kongreso,** Marvik, Norvegio (Knut Lyngstad, Paul Fjermstads vei 41, NO-7017 Trondheim)

27-11 jul.: **Internacia E-Feriado,** Ełk, Pollando (Bjalistoka E-Societo, p.k. 67, PL-15-001 Białystok)

28-29: **Kiel personeco sin strukturas?,** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; prelegas Claude Piron)

28-06 julio: **Meznorvega Jubilea Renkontiĝo,** Trondheim, Norvegio (Ulf Stenhaug, Arne Solbergsv. 32, NO-7075 Tiller; <ust@capgemini.no>; http://www.kvatro.no/~ulf/Eo/esp/MJR.html)

29: **Turisma E-Festo,** Fontevraud, Francio (CCAE, 6 rue du Buis, FR-49000 Angers; ☎+33/2/41-66-83-36)

29-05 jul.: **Hungaria E-ista Semajno,** Budapeŝto (Hungaria E-Asocio, adreso supre)

29-12 jul.: **Somera E-Tendaro,** Lančov, Ĉeĥio (Esperanto-Klubo, adreso supre)

30-04 jul.: **29-a Somera E-Studsemajno,** Jyväskylä, Finnlando (Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FI-40630 Jyväskylä; ☎+358/14/254-609; temo: "Akvo", instruas Atilio Orellana Rojas)

**julio**

04-08: **11-a Internacia Medicinista E-Konferenco,** Krakovo, Pollando (UMEA Shinoda-Kuracejo, str. Centralna 32, PL-31-586 Kraków)

05-12: **63-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj,** Kievo, Ukrainio (Ludmila Galickaja, Sverdlova 186/III, UA-286018 Vinnica)

05-12: **20-a Somera Esperanta Familia/Feria Tendaro,** Thomsdorf apud Feldberg, Germanio (Eckard Raabe, Staakener Heuweg 1, DE-14612 Falkensee; ☎+49/395/422-13-98)

06-11: **E-kursoj ĉe la Universitato de Hartford,** Usono (Office of Summer Programs, University of Hartford, 200 Bloomfield Avenue, West Hartford CT 06117-1599; ☎+1/860/768-44-01; ℻768-51-60; <tonkin@uhavax.hartford.edu>; instruas je tri niveloj Joseph Conroy, Dorothy Holland, Spomenka Štimec kaj Humphrey Tonkin)

06-20: **Kursoj por komencantoj kaj por praktikantoj,** en du partoj, Grésillon, Francio (adreso supre; en la dua semajno instruas André Cherpillod kaj Jeannine Vincent)

08-13: **7-a Internacia E-Kongreso, 7-a Eŭropa E-Forumo kaj 56-a Hispana E-Kongreso,** Valencio, Hispanio (Grupo Esperanto de Valencia, G. V. Fernando el Católico, 45-3a, ES-46008 Valencia; ☎/℻+34/6/384-96-16; <a-casquero@redestb.es>; http://www.redestb.es/personal/a-casquero)

09-12: **Lingvopraktikado,** Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Dominique Baron)

11-20: **Unua Somera E-Lernejo,** Teslić, Bosnio kaj Hercegovino (Gradimir Kragić, Svetog Save H-15, YU-74270 Teslić, Serba Respubliko; ☎+381/74/735-573; ℻731-063; <esperokg@pesha.bc.rstel.net>)

12-15: **45-a Kongreso de E-Ligo por Norda Ameriko,** apud San-Francisko, Usono (ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530; ☎+1/510/653-09-98; ℻653-14-68; <elna@netcom.com>)




*82-a UK de Esperanto,*
*19-26 julio, Aŭstralio*
*Temo: "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo"*

12-17: **33-a Brazila Kongreso de E-o, 1-a Brazila E-ista Infankongreso kaj 18-a Brazila E-ista Junular-Kongreso,** Curitiba, Brazilo (Paranaa E-Asocio, C.P. 1701, BR-80001-970 Curitiba – PR; temo: "Rilatoj inter sciencoj kaj artoj")

12-18: **Internacia E-Konferenco,** Rafina apud Ateno, Grekio (Eric Laubacher, OSIEK, 1 rue des Vosges, FR-78180 Montigny-le-Bretonneux, Francio; ☎+33/1/30-96-67-91; <ericl@iname.com>; temo: "Helenaj influoj en la mondkulturo")

12-19: **3-a Mondkongreso de E-istoj-Handikapuloj,** Pardubice, Ĉeĥio (Josef Vaněček, Na okrouhlíku 21, CZ-53003 Pardubice)

12-19: **Lingvokurso ĉe Balatono,** Hungario (Hungaria E-Asocio, adreso supre)

13-18: **28-a Tutpolia E-Kongreso,** Gliwice, Pollando (skr. poczt. 21, PL-44-101 Gliwice)

13-21: **Laborbrigado,** Padovo, Italio (Vanessa Ferrarato, via Matteotti 21, IT-35045 Ospedaletto Euganeo, Padova; ☎+39/429/90-982)

13-26: **Somera E-Tendaro,** Lančov, Ĉeĥio (Esperanto-Klubo, adreso supre)

15-19: **Praktikado de la lingvo,** dua nivelo, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Marie-Thérèse Lloancy)

15-20: **Kurso pri refleksologio,** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; gvidas Noëlle Weyeneth)

17-23: **11-a Internacia Junulara Semajno,** Pécs, Hungario (Dávid Alko Golden, Damjanich u. 1/c, I. 8, HU-8200 Veszprém, ☎+36/88/424-339; <goldend@hal2000.hal.vein.hu>; temo: "Mez-Eŭropo")

19-26: <u>82-a Universala Kongreso de Esperanto, Adelajdo, Aŭstralio (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo")</u>

19-26: **Internacia studsesio de AIS San-Marino** dum la 82-a UK, Adelajdo (Lewoc, adreso supre)

19-02 aŭg.: **16-a Katolika E-Tendaro,** Sebranice apud Litomyšl, Ĉeĥio (Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-75127 Penčice)

20-03 aŭg.: **Kursoj por komencantoj kaj por praktikantoj,** en du partoj, Grésillon, Francio (adreso supre; en la unua semajno instruas Georges Lagrange)

22-27: **Preparo al la Matureca Ekzameno (literatura fako),** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; gvidas Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer)

24-31: **53-a Internacia Junulara Kongreso kaj Internaciaj kursoj por komencantoj,** Assisi, Italio (Alessandro Amerio, via Cumiana, 45, IT-10141 Torino; ☎+39/11/385-42-00; ℻/545-731; <a.amerio@agora.stm.it>; http://www.arpnet.it/esper/iej/iej.htm; temo: "La homo. Ĉu super aŭ parto de la naturo?"; resp. Cristina de' Giorgi, via L. Pera 10, IT-56100 Pisa, ☎+39/50/576-638)

26-02 aŭg.: **19-a Renkontiĝo de E-istaj Familioj,** Savudrija, Kroatio (Kroatia E-Ligo, Ankica Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/328-265; ℻1/481-01-52)

26 jul.-16 aŭg.: **Internaciaj kursoj pri Martinus-kosmologio,** Klint, Danio (inter la 3-a kaj 16-a de aŭg. instruas E-on Atilio Orellana Rojas; vd. ankaŭ 10-16 aŭg.)

27-02 aŭg.: **31-a ILEI-Konferenco,** Avalon, apud Geelong, Melburno, Aŭstralio (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE-24294 Hörby, Svedio; http://www.webcom.com/~donh/Esperanto/ILEI.html; temo: "Multkultureco kaj lingvolernado")

27-09 aŭg.: **Somera E-Tendaro,** Lančov, Ĉeĥio (Esperanto-Klubo, adreso supre)

29-03 aŭg.: **Speciala programo por familioj,** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

31-06 aŭg.: **2-a Eŭropa E-Festivalo,** Budapeŝto, Hungario (Hungaria E-Asocio, adreso supre; temo: "Komunikado en internaciaj organizoj")

31-07 aŭg.: **3-a Internacia Arkeologia Laborbrigado,** Blera, Italio (Pier Luigi Cinquantini, via Dante Alighieri 2, IT-01010 Blera, Viterbo)

**aŭgusto**

01-07: **FESTO,** internacia renkontiĝo de Junulara E-ista Franca Organizo, Saint-Raphaël, Francio (Pascal Lécaille, B.P. 3019, FR-69394 Lyon Cedex 03; ☎+33/4/72-36-07-14; <pascal@zen.dedal.fr.net>)

02-09: **70-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda,** Aŭgsburgo, Germanio (Hermann Schmid, Waterloostr. 21, DE-86165 Augsburg; ☎+49/821/792-835; ℻713-074)

02-09: **4-aj Someraj Kursoj,** Grožnjan, Kroatio (Orbis Pictus, adreso supre; instruas Spomenka Štimec k.a.)

03-09: **33-aj Baltiaj E-Tagoj,** Haapsalu, Estonio (E-Asocio de Estonio, Raekoja pl. 14, EE-0001 Tallinn; ☎+372/2/682-807; 📠631-11-57)

03-17: **Kursoj por komencantoj, praktikantoj kaj lertuloj,** en du partoj, Grésillon, Francio (adreso supre; en la dua semajno instruas Przemek Grzębowski)

04-18: **Naturprotekta tendaro por 12-16-jaruloj,** Dnestrovskije Plavni, Ukrainio (Tatjana V. Auderskaja, Korolenko 5-b, kv.26, UA-270100 Odessa; 📠+7/380/482-52-28-05; <wildlife@paco.odessa.ua>; nur aliĝkotizo, partopreno senpaga)

05-09: **Kino en Esperanto,** Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Judita Schiller)

05-10: **Kiel kaj kion informadi pri Esperantio?,** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; gvidas Marco Picasso)

08-16: **Somera E-Tendaro,** Lančov, Ĉeĥio (Esperanto-Klubo, adreso supre)

09-10: **84-a Japana E-Kongreso,** Aŭa-Ikeda, Japanio (Tokusima-ken, Tanimati, Miyosi-gun, Ikeda-mati JP-778; ☎/📠+81/883/720-438; <shigeaki@pm.tokushima-u.ac.jp>)

09-16: **Internacia Ferio-Semajno de TANEF** (E-Fako de la Naturamika Internacio), Kniebis, suda Nigra Arbaro, Germanio (Erna Döring, Poŝtkesto 225, CH-4003 Basel, Svislando)

09-17: **Eŭropo-Azio '97,** Jekaterinburgo, Rusio (p.k. 67, RU-620077 Jekaterinburg-77; ☎+7/3432/224-501, 235-785; <hrgo@sbank.e-burg.su>; temo: "Esperanto en la nova jarcento")

10-16: **E-semajno pri Martinus-kosmologio,** Klint, Danio (Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 København F; ☎+45/38-34-62-80; 📠38-34-61-80; <martinus@centrum.dk>)

10-16: **Somera E-Tendaro,** Lančov, Ĉeĥio (Esperanto-Klubo, adreso supre)

10-17: **Kurso pri E-literaturo,** bieno Njeguš, Kroatio (Orbis Pictus, adreso supre; instruas Spomenka Štimec)

10-23: **Somera E-Lernejo,** Poprad, Slovakio (E-o – Regiona Societo, adreso supre)

11-18: **Junulara Ekumena E-Tendaro,** Unterkirnach apud Villingen-Schwenningen, Germanio (Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen)

12-16: **Evoluo de la skribado kaj de la manskribo kaj Lingvopraktikado,** Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, adreso supre; gvidas Marco Picasso kaj Suzanne Bourot, resp. Jacqueline Poux)

12-17: **Speciala kurso okaze de la mondkongreso de speleologio,** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

15-21: **26-a Internacia Renkonto Naturamika,** Abaliget apud Pécs, Hungario (E-Asocio de Baranya, pf. 98, HU-7601 Pécs; ☎+36/72/333-123)

17-23: **Turisma Semajno en Altaj Tatroj,** Poprad, Slovakio (E-o – Regiona Societo, adreso supre)

17-24: **Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj,** Grésillon, Francio (adreso supre; temo: "Ombroj de kulturo", instruas Przemek Grzębowski)

19-24: **Kiel organizi kongres(et)ojn?,** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; gvidas Gian Carlo Fighiera)

23-29: **66-a Itala Kongreso de E-o,** Napolo (Harmonio kaj Progreso, Via Santa Brigida 64, c/o UUCI, IT-80132 Napoli; ☎+39/81/713-08-06; 📠551-08-74)

30-05 sep.: **3-a Itala studsesio de AIS San-Marino lige al la 18-a Sanmarina Studsesio,** Rimini (Italio) kaj San-Marino (Lewoc, adreso supre)

31-07 sep.: **50-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista,** Romo-Rimini, Italio (IKUE, Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 Roma; ☎+39/6/541-44-15; <C.Sarandrea@agora.stm.it>)

## septembro

01-15: **Internacia E-feriado kun folkloro,** Krościenko, Pollando (ul. Kingi 6, PL-34-450 Krościenko)

08-15: **Internacia Semajno E-ista,** Montpeliero, Francio ("Esperanto", 5 rue du Docteur Roux, FR–34090 Montpellier; ☎+33/4/67-54-15-43)

11-14: **Mikologia seminario,** Poprad, Slovakio (E-o – Regiona Societo, adreso supre)

19-21: **Dua E-ista Renkontiĝo de Serba Respubliko,** Banja Luka, Bosnio kaj Hercegovino (Gradimir Kragić, Svetog Save H-15, YU-74270 Teslić, Serba Respubliko; ☎+381/74/735-573; 📠731-063; <esperokg@pesha.bc.rstel.net>)

27-28: **La streso: kiel eviti ĝin? (dua parto),** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; prelegas Tazio Carlevaro)

27-05 okt.: **23-a Internacia Forumo pri E-turismo kaj kulturo,** Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, adreso supre)

## oktobro

04-11: **5-a Internacia E-Semajno por la Kulturo kaj Turismo,** Sant Carles de la Rapita (Tarragona), Katalunio (Hispana Fervojista Esperantista Asocio, Apartado 15027, ES-08080 Barcelona, Hispanio; ☎+34/3/727-50-21)

16-18: **Simpozio de E-Federacio de Kvinslando,** Withcott ĉe Brisbano, Aŭstralio (Merv Schramm, 56 Skyline Dr., Seven Hills Q. 4170; ☎+61/7/33-98-40-02)

18-21: **17-a Film- kaj Video-konkurso de la Ĉeĥa sekcio de FISAIC,** kun fervoja temaro, Brno, Ĉeĥio (Kava-Pech, adreso supre)

25-26: **Enkonduko al la ludteorio,** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; prelegas Reinhard Selten)

## novembro

13-16: **Internacia seminario,** Zagreb, Kroatio (Kroata E-ista Unuiĝo, adreso supre)

15-17: **3-a Kolombia E-Kongreso,** Medeĵino (Medellín), Kolombio (Luis Guillermo Restrepo Rivas, Apdo Aéreo 4262, Medellín, Kolombio; ☎+57/94/265-13-41; 📠+57/4/510-07-82; <lrestrer@eeppm.epm.com.co>)

29-30: **Ivo Lapenna (1909-1987): Liaj vivo kaj verkaro,** La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre; prelegas Birthe Lapenna)

## decembro

05-07: **Sankt-Nikolaa Festa Renkontiĝo,** Pollando, (E-o – Regiona Societo, adreso supre)

27-29: **2-a E-Videofestivalo Internacia,** kun samtempaj Cseh-metodaj kursoj, Trutnov, montaro Krkonoše, Ĉeĥio (Kava-Pech, adreso supre)

27-03: **14-a Internacia Festivalo** por mezaĝuloj kaj junaj familioj, Trier, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; ☎+49/5624/8007; 📠5624/322)

29-02: **Jarŝanĝa renkontiĝo,** Trutnov, Ĉeĥio (Kava-Pech, adreso supre)

29-02 jan.: **Budapeŝta Silvestro,** Budapeŝto, Hungario (Hungaria E-Asocio, adreso supre)

30-02 jan.: **Transjara Kurskunveno,** Kameoka, Japanio (E-Propaganda Asocio, adreso supre)

30-02 jan.: **Silvestra balo, vintraj ekskursoj,** (E-o – Regiona Societo, adreso supre)

30-03 jan.: **Silvestra balo,** kulturaj aranĝoj kaj ekskursoj, Parizo, Francio (Raymonde Pérault, Centre Culturel Espéranto de Paris, 4 bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; ☎+33/1/42-78-68-86; 📠42-78-08-47)

## 1998

## januaro

01-11: **18-a Aŭstralia Skolta Ĵamboreo,** kun Esperanta tendo, Springfield apud Brisbano, Aŭstralio (Jennifer Dimo, 83 Rocky Gully Rd., Coominya 4311 QLD; ☎+61/74/264-299)

02-04: **Bonvenigo de nova jaro en Prago,** Ĉeĥio (Kava-Pech, adreso supre)

05-16: **14-a Aŭstralia Esperanta Kvin-nivela Somerlernejo,** Queensland apud Brisbano, Aŭstralio (Jay Grant, 32 Abbey St., Forestdale Q. 4118; 📠+61/7/38-00-43-12; <jgrant@gil.com.au>)





# Internacia flugkaravano

**parte kunlabore kun UEA, lige al UK de Frankfurto al Adelajdo kaj reen tra pintaj turismaj allogaĵoj**

**1997-07-16/08-02**

**Informoj kaj aliĝiloj:**
**Petro Chrdle, KAVA-PECH**
**Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, Ĉeĥio**
**☎+420/2/991-22-01; 📠+420/2/991-21-26;**
**rete: <chrdle@kava-pech.cz>**

# Laste aperis



**Al la mondo donace. Antologio de la serba porinfana poezio.** Elektis kaj el la serbokroata trad. Zlatoje Martinov. Beograd: Strategia, 1996. 80+80p. 20cm. Dulingva. 57 poemoj de 22 poetoj. Kun notoj pri la aŭtoroj. 24,00 gld. *Triona rabato.*

**Almanako Lorenz 1997.** Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1997. 96p. 21cm. Artikoloj, eseoj kaj poemoj plejparte spiritismaj. 9,90 gld.

**Atlantido. La perdita kontinento.** André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1997. 59p. ISBN 2 906134 39 2. 21cm. Pluan fojon la multascienca aŭtoro kritike ekzamenas faman enigmon kaj proponas siajn konkludojn. 15,90 gld.

**Elĉerpaĵoj el la irlandlingva literaturo.** Kompilis Liam Ó Cuirc. Dulingva. El la irlanda trad. pluraj. E-Asocio de Irlando, 1996. 27p. 21cm. Dek du beletraj specimenoj el diversaj epokoj. 4,20 gld.

**Esperanta fabelo. Duhora intensa lernaĵo.** Ulla Richter (1919). La aŭtoro, 1996 (neindikita). 38p. 15x21cm. Ilustrita fabelo instruanta gramatikaĵojn. 6,00 gld.

**Esperanto for beginners.** Montagu C. Butler (1884-1970). E-Asocio de Britio, 1996 (neindikita). 24p. 16cm. 10 lecionoj plus vortareto. Klasika lernilo daŭre uzinda. 2,70 gld.

**Esperanto-medaloj. 1912-1995.** Hans Jankowski (1929). La aŭtoro, 1995 (neindikita). 32p. 21cm. Informriĉa katalogeto por kolektantoj. Kompletigo de la broŝuro *Esperanto-medaloj + moneroj* (1990). 13,50 gld.

**Filmo por pli ol 16[-]jaruloj kaj aliaj noveloj.** János Sárközi (1932). Debreceno: Debrecena Bulteno, 1996. 41p. 21cm. Sep facile legeblaj rakontoj. 6,60 gld.

**Gunkela vortaro.** Claus J. Günkel (1963). Viersen: la aŭtoro, 1997 (3-a eld). 43p. 21cm. 912 kapvortoj post-PIVe registritaj aŭ nove proponataj, inkl. proprajn nomojn. 6,00 gld.

**Gvidlibro por loka informado.** Aldo Viotto kaj Elda Doerfler. Triesto: Triesta E-Asocio, 1996. 30p. 21cm. Modela tekstaro por verki gazetarajn komunikojn lige al Esperanto-eventoj. 16,50 gld.

**Jarkolekto "Esperanto" 1996.** Rotterdam: UEA, 1997. 220p. 27cm. Bind. 51,00 gld.


**Languages in International Organizations: a Half-Century of International Order? Report of the 13th Annual Conference on Language and Communication.** Red. Humphrey Tonkin. En la angla. Hartford: Centro de Esploro kaj Dokumentado, 1996. 57p. 28cm. Prelegoj de CED-konferenco pri la historio, nuntempo kaj estonteco de la lingvaj servoj de Unuiĝintaj Nacioj. 24,00 gld.

**Laoco, La. Tao-te-ĉing aŭ La libro de moralo.** Lao-Tan (579-499 a.K.). El la ĉina trad. Seiho Nishi (1885-1978). Beauville: Amika E-Rondo/Laŭte!, 1996. 23p. 21cm. La tuta teksto de la multe citata kaj interpretata ĉina filozofiaĵo. Unue aperis en *La Revuo Orienta* (1966). 2,40 gld.

**Lernolibro pri Sankta Rita. La 15 ĵaŭdoj.** El la itala trad. Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Voce del Centro Esperantista Piceno, 1995. 56p. 21cm. Biografio de sanktulino, en 15 partoj, kun atestaĵoj pri ŝiaj mirakloj kaj kun preĝoj. 13,50 gld.

**Mallonga historio de la Esperanto-movado en Irlando.** Liam Ó Cuirc (1922). E-Asocio de Irlando, 1996. 32p. 21cm. 4,20 gld.

**Manekenoj kaj ni.** Gilbert R. Ledon (1931). La aŭtoro, 1996. 27p. 23cm. Teknikaj kajeroj 1. Spertoj el 30-jara fabrikisteco de plastaj manekenoj. 6,00 gld.




**Mednarodni jezik Esperanto in jezikovna demokracija.** Red. Janez Zadravec. Slovenlingva. Ljubljana: Slovenia E-Ligo, 1996. 43p. ISBN 961 6100 27 0. 21cm. Informlibreto pri la lingva diverseco, pri la internacia komunik-problemo kaj Esperanto kiel ĝia solvo. 6,00 gld.

**Metodiĉeskie razrabotki po jazyku Esperanto (dlja uĉaŝĉihsja zaoĉnyh kursov).** M.S. Abolskaja. Leningrad: Konkordo, 1990. 88p. 26cm. Baza lernilo por ruslingvanoj, kun dudirekta vortolisto. 9,90 gld.

**Morto neniun forgesas, La** (1989). Didier Daeninckx (1949). El la franca trad. Christian Rivière. Nantes: la tradukinto, 1996. 172p. 21cm. Ĵurnalisto malkovras la veron pri la memmortigo de iama samklasano, kiam li faras raportaĵon pri grupo de rezistantoj kondamnitaj pro murdo post la dua mondmilito. 24,90 gld.

**Mrguda** (1902). Petar Kočić (1877-1916). El la serbokroata trad. Boriŝa Miliĉeviĉ. Dulingva. Banja Luka: E-Societo "La Mondo", 1996. 10p. 24cm. Romantika rakonto de bosnia klasikulo. 4,20 gld.

**"Ne nur vortoj, sed agoj". Artikoloj (1950/1989).** Roland Levreaud (1919-92). Beauville: SAT-Broŝurservo/Laŭte!, 1997. 110p. 21cm. Plej diverstemaj artikoloj de elstara SAT-aganto. 13,80 gld.

**Patro mia laca / L' avantaĝo de l' vertebroj.** Gellu Naum (1915). El la rumana trad. Sasha Vlad kaj Ionel Oneţ. Berkeley: Bero, 1995. 44p (nenumeritaj). ISBN 1 882251 15 6. 22cm. Poemaro de centra figuro de la rumana surrealismo. 13,80 gld.

**Pikniko ĉe vojrando** (1971). Arkadij (1925) kaj Boris (1933) Strugackij. El la rusa trad. Mikaelo Bronŝtejn. Moskvo: Impeto, 1996. 190p. ISBN 5 7161 0027 9. 20cm. Romano de klasikuloj de la rusia sciencfikcio, famiĝinta ankaŭ per la filmo *Stalker* de Tarkovskij. Aliplanedanoj vizitis la Teron kaj foriris, sed lasis post si la misterplenan Zonon. 19,80 gld.

**Prelegoj kaj aliaj artikoloj.** Roland Levreaud (1919-92). Beauville: SAT-Broŝurservo/Laŭte!, 1997. 78p. 27cm. Tekstoj aperintaj en *Sennacieca Revuo* inter 1961 kaj 1989, pri temoj tiel diversaj kiel ĵazmuziko, atomcentraloj kaj famaj aŭtodidaktoj. 15,90 gld.

**Sociala problemo en nia socio.** El la franca trad. anoj de la Liberecana Frakcio de SAT. Beauville: SAT-Broŝurservo, 1996. 43p. 21cm. Kritiko de la nuna soci-ordo kaj propono de liberecana federacia socio. 4,20 gld.

## DIVERSAĴOJ

**Sonkasedo: Teatra vespero de Vida Jerman.** Zagreb, 1996 (neindikita). 72 min. *Izolulo* (muzik-poezia recitalo de kroataj poetoj); *Inventante ke mi sonĝas* (monologo de José Augustín). 24,00 gld.

**Vidbendo: Al Sud-Aŭstralio; lo neordinara.** M.E. Furness. Adelajdo: la aŭtoro, 1996. 31+13 min. VHS-PAL. Pri lokoj kiajn celos ekskursoj de la Adelajda UK, kaj pri tipaj bestoj de la regiono. 42,00 gld.

**MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,** Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

# Kuraĝigaj ciferoj

**Jam la trian jaron la Libroservo de UEA registras modestan, sed konstantan kreskon.**

La malnetaj enspezoj de la Libroservo en 1996 atingis 279 796 gld., 9,5% pli kompare kun la antaŭa jaro. Iom malpli sed tamen konsiderinde kreskis la neta gajno, kiu superis je 7,5% la ciferojn de 1995. Decide influis tiujn rezultojn la libroservo de la Praga UK, kies vendoj rekordis super tiuj de ĉiuj antaŭaj kongresoj, kaj la malfortiĝo de la guldeno kompare kun kelkaj gravaj valutoj, kio plialtigis la aĉetpovon de parto de la merkato.

La jarfina apero de la populara lernolibro de Audrey Childs-Mee, *Saluton!* (6-a eldono), nur et-parte kontribuis al la vendo-kresko (+19%) de titoloj eldonitaj de UEA, kresko kiu dankeblas ĉefe al ofertokampanjoj, al rabataj vendoj dumkongresaj kaj al la debito de unu el la lastaj UEA-eldonaĵoj, *La aboco de tempoplanado*, kiu pintas en la listo de "entutaj" vendoj.

Krom tiu tabelo, en kiu speguliĝas la aĉetopolitiko de libroservoj kaj la preferoj de dumkongresaj klientoj, aperas statistiko de titoloj unuope venditaj, rezulto de la elektoj de individuaj aĉetantoj.

*pz*

VENDOJ ENTUTE

| | | |
|---|---|---|
| 253 | La aboco de tempoplanado, L.J. Seiwert, W.U. Graichen | 7,50 gld. |
| 235 | Pasporta Servo | 24,00 gld. |
| 202 | Esperantem za tři měsíce, P. Chrdle, S. Chrdlová (E-lernilo por ĉeĥlingvanoj) | 17,40 gld. |
| 182 | Asteriks kaj la normanoj, Goscinny/Uderzo | 19,80 gld. |
| 160 | Asteriks kaj Kleopatra, Goscinny/Uderzo | 19,80 gld. |
| 153 | Gerda malaperis!, C. Piron | 7,20 gld. |
| 152 | Faktoj kaj fantazioj, M. Boulton | 36,00 gld. |
| 145 | La serĉado de la perfekta lingvo, U. Eco | 36,00 gld. |
| 142 | Plena Analiza Gramatiko, Kalocsay/Waringhien | 48,00 gld. |
| 133 | Esperanto for beginners, M.C. Butler | 2,70 gld. |
| 112 | La metamorfozo, F. Kafka | 24,00 gld. |
| 106 | Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj | 4,80 gld. |
| 102 | Baza ĉeĥa konversacio, S. Chrdlová, M. Malovec | 3,00 gld. |
| 101 | Muzik-pluvo, kompakta disko de Akordo | 30,00 gld. |
| 99 | Esperantaj sinonimoj, J. Ojalo | 15,00 gld. |
| 97 | Fundamenta krestomatio, L. L. Zamenhof | 33,00 gld. |
| 94 | Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj, Goscinny/Uderzo | 19,80 gld. |
| 92 | Nova Esperanta krestomatio, red. W. Auld | 57,00 gld. |
| 90 | Kubaj popolaj fabeloj, red. M. Bacev | 4,50 gld. |
| 90 | Proverbaro esperanta, L. L. Zamenhof | 18,00 gld. |

UNUOPAJ VENDOJ

| | | |
|---|---|---|
| 85 | La serĉado de la perfekta lingvo, U. Eco | 36,00 gld. |
| 76 | Asteriks kaj la normanoj, Goscinny/Uderzo | 19,80 gld. |
| 47 | Pasporta Servo | 24,00 gld. |
| 45 | Asteriks kaj Kleopatra, Goscinny/Uderzo | 19,80 gld. |
| 42 | Esperanta antologio, red. W. Auld | 27,00 gld. |
| 38 | Hetajro dancas, E. Urbanová | 51,60 gld. |
| 36 | La aboco de tempoplanado, L.J. Seiwert, W.U. Graichen | 7,50 gld. |
| 36 | Tena, S. Štimec | 22,50 gld. |
| 34 | Fundamenta krestomatio, L.L.Zamenhof | 33,00 gld. |
| 33 | La Kunularo de l' Ringo, J.R.R. Tolkien | 48,00 gld. |
| 31 | Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj, Goscinny/Uderzo | 19,80 gld. |
| 31 | La du turegoj, J.R.R. Tolkien | 42,00 gld. |
| 31 | Proverbaro esperanta, L.L. Zamenhof | 18,00 gld. |
| 28 | Lingvo kaj vivo, G. Waringhien | 48,00 gld. |
| 27 | Faktoj kaj fantazioj, M. Boulton | 36,00 gld. |
| 27 | Winnie-la-Pu, A.A. Milne | 27,00 gld. |
| 25 | Nova Esperanta krestomatio, red. W. Auld | 57,00 gld. |
| 25 | La vivo de d-ro L.L. Zamenhof en bildoj, H. Thien | 30,00 gld. |
| 24 | Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo, A. Chiti-Batelli/P. Janton | 4,80 gld. |
| 24 | Vocabolario italiano-esperanto, C. Minnaja | 120,00 gld. |

# El la vivo de la CO

Dum la tuta jaro 1996 la CO nombris la sendaĵojn poŝte ricevitajn, escepte de ekspresaj kaj registritaj leteroj. La rezulto: jan. 1679, feb. 1689, marto 1841, apr. 1451, majo 1630, jun. 1423, jul. 981, aŭg. 1103, sep. 1254, okt. 1571, nov. 1377, dec. 1441; sume 17 440 sendaĵoj.

Ricevitaj retmesaĝoj nombris 3311 kaj telefaksoj (laŭ takso surbaze de la efektiva nombro en apr.-dec.) 3750. Se konsideri ke la CO ricevas krome ĉiusemajne almenaŭ 10 ekspresajn aŭ registritajn leterojn, la totala nombro de komunikaĵoj estis super 25 000, averaĝe po 100 labortage. Al tio aldoniĝas tage 30 ĝis 50 telefonvokoj.

Oni ne daŭrigas la statistikadon en 1997, tamen eblas jam konstati, pro ilia aŭtomata nombriĝo, la daŭran plimultiĝon de retmesaĝoj: en la unuaj 54 tagoj de 1997 venis 883 da ili, 78% pli ol en averaĝa periodo simile longa en 1996. ★




**• Aŭstrio: E-muzeo surdiske**

Aŭstria Nacia Biblioteko, kies parto estas Internacia E-Muzeo (vd. nov., p. 182), eldonis pri si 3-eran interagan kompakt-diskaron, sur kiu troviĝas i.a. 5-minuta Esperantlingva prezento de IEM. (K. Fetes-Tosegi)

**• Britio: Festivale en Barlaston**

Partoprenis ĉ. 25 homoj en "festivala" semajnfino en Barlaston (Britio). Kunvenis fine de januaro tri grupoj: komencantoj, teatro-ŝatantoj — kiuj okupiĝis i.a. pri unuaktaĵo de Bernard Golden — kaj instruistoj, kiuj sub aŭspicio de la brita ILEI-sekcio kaj gvidate de John Ibbotson sin dediĉis i.a. al instru-metodoj kaj aŭskultis prelegon de Hilary Chapman pri "Kiel uzi la kulturon de Esperanto dum la instruado". (P. Gubbins)

**• Bulgario: Alvoko al la socio**

La partoprenantoj de la 47-a Kongreso de Bulgara E-Asocio (6-8 septembro, Pazarĝik) akceptis alvokon al la socio de Bulgario, kies tezoj baziĝas sur la Manifesto de Prago. En la estrara raporto prezidanto Kiril Popov alvokis la lokajn klubojn kaj organizojn al pli memstara agado. Li deklaris krome ke mono devas ne plu esti elspezata "laŭ la malvirta antaŭa maniero — por pompaj kaj luksaj aranĝoj, por senvaloraj kaj nevendeblaj libroj, por sennombraj oficvojaĝoj. Ni devas investi ĉion kion ni posedas saĝe, por havigi al BEA domon en Sofio." (K. Popov)

En aŭtuno oni festis la 50-jaran jubileon de la loka E-aktiveco en la urbeto Polski Trambeŝ, por kiu alvenis 50 gratulleteroj el tri kontinentoj. Honore al la datreveno, la urbestraro decidis doni al la urba hotelo la nomon "Esperanto". (H. Manolov)

La 24-an de okt. E-Societo Albatroso en Varno omaĝis per festo al la 90-jara docento Georgi Dimov, kiu dum 75 jaroj da aktivado elstaris i.a. kiel Ĉeĥ-instruisto, verkanto de lernolibroj kaj kunkompilanto de la granda E-bulgara vortaro. (I. Panajotov)

**• Francio: Verne-faldfolio**

La dokumentara Centro Jules Verne (2 rue Charles Dubois, FR-80000 Amiens) eldonis Esperantlingvan faldfolion pri Amiens, la urbo kie la franca verkisto vivis en la dua parto de sia vivo. (*Franca Esperantisto*)

**• Irlando: Nova Esperanto-domo**

En januaro estis fondita en meza Irlando la Esperanto-domo Carsfearna: centro esperantista, interlingvistika kaj muzika. Adreso: Garbhan MacAoidh (MacKay) kaj Máire NicAoidh, "Carsfearna", Br. Cluain Minse/Clonminch Rd., Tulach Mhór, Co. Uíbh Fháilí; ☎+353/506/22-865; <carsfrn@iol.ie>. (G. MacKay)




**• Ĉinio: Lernejo en Manĉurio**

En Changcun, ĉefurbo de la norda provinco Jilin, la provinca E-Asocio kaj Changcun Verdstelo-Kompanio fondis E-lernejon, kiu komencis siajn aŭtunajn kursojn kun 40 lernantoj. Direktoro ZHANG Jiping (Jianshe jie 79, Gezilou 213, CN-130061 Changcun), kiu instruas sur la foto, serĉas kontaktojn tutmonde kaj volonte akceptas donace malnovajn E-librojn kaj -gazetojn.

**• Hungario: Imposto por Esperanto**

Laŭ nova leĝo, ĉiu hungara civitano rajtas disponi pri 1% de sia laŭenspeza imposto por subvencii difinitan organizon neprofitcelan, indikante en sia ĉiujara deklaro ties impostnumeron. Tio koncernas ankaŭ plurajn E-organizojn. Fondaĵo Esperanto de Kultura E-Asocio ĝis nun elspezis ĉ. 200 mil forintojn (2170 gld.), dissendante ĉ. 5000 leterojn al nunaj aŭ iamaj esperantistoj por reklami la novan eblon kaj informi pri sia impostnumero. Ĉiokaze ĝi ankaŭ lanĉis kampanjon, kun dekmilo da flugfolioj kaj kun afiŝoj, "kontraŭ la lingva kaj kultura koloniado" usona en Hungario. Post la ĉijara impostodeklaro, la landa impostoficejo publikigos la koncernajn ciferojn en oktobro. Se kolektiĝus sufiĉe da 1-%-aj pagoj de esperantistoj kaj de simpatiantoj, la rentumo de tiu sumo povus solvi multajn financajn problemojn. (O. Princz, L. Szilvási, *Eventoj*)

**• Katalunio: Angla E-ekzameno**

Post komparebla evento en Israelo (vd. jul.-aŭg., p. 138), ankaŭ en Katalunio E-o fariĝis ekzamen-temo, en oficiala ekzamenaro por estontaj universitatanoj. La kandidatoj devis, leginte komunikaĵon anglalingvan de la agentejo Reuter pri la Tamperea UK, verki aŭ pledon por la angla kiel internacia lingvo, aŭ tekston "Al la gejunuloj de la mondo", titolo kiun la tezo erare atribuas al "la lasta mesaĝo verkita de Zamenhof". (*Kataluna Esperantisto*)

**Pollando-Ĉeĥio: Komenio-Zamenhof**


La 3-an de aprilo oni inaŭguros en la Ĉeĥa Kultura Centro en Varsovio ekspozicion, daŭrontan ĝis la 30-a de aprilo, pri Komenio kaj Zamenhof. Informoj: Ladislav Fiala, Nowickiego 3/20, PL-02112 Warszawa, Pollando; ☎+48/22/232-446.

**SE VI NE SCIAS PRI IO, NE KULPIGU ALIAJN!**
**→ Abonu al Eventoj!**
*pk. 87. HU-1675 Budapest, Hungario*

## • Rusio: Kongreso de patroj kaj filoj

Rusian E-istan Kongreson (REK '97, 31 jan. - 2 feb., Moskvo) partoprenis ĉ. 75 personoj el 23 urboj de Rusio kaj gastoj el 6 landoj. La temo "Patroj kaj filoj en nuna Esperantujo" estis arde diskutata. La rezulto de la pritema diskuto estis kongresa rezolucio, kiu ambicias estingi nenecesajn kverelojn pro nesufiĉa interkompreno inter generacioj. La ĉeestantaj 25 anoj de Rusia E-ista Unio elektis novan estraron: la nova prezidanto iĝis Abduraĥman Junusov, vic-prezidanto Mikaelo Ĉertilov, estraranoj Viktoro Aroloviĉ, Vladimir Bespalov, Sergeo Bronov, Nikolao Gudskov, Aleksandro Kogan, Helena Ŝevĉenko kaj Aleksandro Titajev.

Kunsidis i.a. instruistoj (post dutaga pedagogia seminario), ĵurnalistoj kaj komunistoj. Naŭ rusiaj membroj de SAT aŭ de "Esperanto" Radikala Asocio fondis Popolan Rusian E-Movadon (PREM), kiu celas propagandi Esperanton en maldekstraj partioj, sindikatoj ktp. (N. Gudskov, D. Cibulevskij)



## • Svedio: Esperanto-domo ekfunkciis

La nova Esperanto-domo en Lesjöfors (vd. jan., p. 17), loko por estontaj someraj kursoj, estas jam aĉetita, kaj la ĉambroj en ambaŭ etaĝoj plene meblitaj. La domo ekfunkciis la 1-an de februaro, antaŭ la oficiala inaŭguro, akceptante la unuajn tranoktantojn en sia 58-lita junulargasteja parto. (F. Luin)

Ekde la 18-a de decembro la Sveda ŝtata Edukradio disaŭdigis tutlande serion de 5 ĉiumerkredaj programoj 20-minutaj pri Esperanto, realigitaj en la lasta junio (vd. okt., p. 179) ĉe la E-Fako de Karlskoga Popola Altlernejo. La serio estis ripetita en januaro-februaro; plia ripeto estas planata dum la jaro, kaj oni disaŭdigos ĝin ankaŭ kadre de regionaj programoj de la Edukradio. (*Norvega Esperantisto*, F. Luin)

## ANONCETOJ


**Esperanta Turisma Servo** Srilanka (Esperanto-Centro Jaela, 197 Indivitiya Rd., Hettigama, Jaela, Srilanko) deziras kontakti vojaĝantojn kaj turismajn entreprenojn interesatajn pri turismo en Srilanko. Korespondas Esperante, angle. Aldonu 2 irk-ojn aŭ unu USD por frua respondo.

**D-rino Katalin Smidéliusz** petas siajn iamajn kursanojn sendi bildkarton de siaj loĝlokoj por printempa universitata propaganda ekspozicio. Adreso: BDTF, Idegen Nyelvi Lektorátus, HU-9700 Szombathely, Pf. 170, Hungario.

**Itala esperantistino kaj planlingvistino** deziras lerni la originalan planlingvon Volapük de Schleyer, kaj pro tio ŝi kontaktus volapukistojn kaj adeptojn de la originala Volapük. Ŝi volas ankaŭ havi informojn pri la planlingvo Glomifiliano, kreaĵo de la greka inventulo Evangelos Filippos. Skribu itale, Esperante, france aŭ angle al Ada Ricchiuto, Via Umbria 43, IT-74100 Taranto, Italio.

**35-jara, legema kaj muzikema komencanto** emas korespondi. S-ro Mostefa Farrokhi, Iran Marine Industrial Co., Sadra Offshore Yard, Irano.


## OFICIALA INFORMILO

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Argentino: Atilio Orellana Rojas. Belgio: Clara Bracke. Ĉinio: WANG Xue. Francio: Françoise Noireau; Louise Marin; Marc Bavant. Germanio: Christian Darbellay; Thomas Bormann. Hungario: Tibor Veress. Japanio: AOYAMA Tooru; HONDA Terumi; ISHIBE Atsuko; OIKAWA Yukiko. Nederlando: M.G.M. van Geffen. Usono: Nathan Treadway. Vjetnamio: NGUYEN Hoanh Phi.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimume $25): Germanio: Heinrich Nischwitz. Kanado: Kenneth F. Price. Meksiko: Julie L. Regal.
AMIKOJ (minimume $10): Usono: José R. Vazquez; Pauline Ledeen; Peggy O'Brian Dolter; Steven E. Sorenson.

PATRONOJ DE TEJO 1997

Belgio: J.A. Pinto de Sousa; Stella De Weerd. Finnlando: Päivi Saarinen. Francio: Alain Pialla; Henri Roy; Hervé Mougin; Paulette Naulet; Paul Samain. Germanio: Franz Knöferl; Martin Haase. Italio: Lidia Neri Lami; Gianfranco Polerani. Japanio: Yosiki Tatumi. Korea Resp.: Sung Ho Cho. Kroatio: Sanja Bokulić. Nederlando: F.J. Pieterson-Kruger.

SOCIETO ZAMENHOF 1997

Aŭstralio: Nassif Isaac. Belgio: J.A. Pinto de Sousa; Stella De Weerd. Britio: Sybil V. Sly. Francio: Eloi Thiollière; Henri Roy; René Lemaire. Germanio: Heinrich Nischwitz; Helga Erhard; Helmut Welger; Helmut Klünder; Richard Schulz; Peter Weide. Hispanio: Josep Castelltort i Riba. Italio: Lidia Neri Lami. Japanio: Mouam Eun; Takeo Sugano. Korea Resp.: Yung-myung Kim. Meksiko: Julie L. Regal. Nederlando: Mag. G.F. Makkink; Willem P. Roelofs. Svedio: †Eugen Rytenberg; Lennart Svensson. Usono: Arnold Victor; Doris Vallon-Wheeler; Robert A. Swenson.

DONACOJ 1997 (gld.)
ĝis la 31-a de januaro

**Fondaĵo Canuto:** Francio: C. De Coudenhove 33,20; A. Gaillard 99,60; R. Gonin 61,00; L. Marin 99,60; M. Massemin 43,16; O. Masseron 33,20; M. Savre 66,40; B. Schumann 56,44; D.-S. Clopeau 33,20. Germanio: G. Macioszek 336,00. Nederlando: F. Zeiler 100,00. Sumo ĉi-jara 961,80.
**Ĝenerala Kaso:** Nov-Zelando: T. Jansen 6,00. Nederlando: A. Kriek 20,00; G.F. Makkink 800,00; J.M.Niemans-van Beek 14,88; A.W. Treurniet 75,00. Sumo ĉi-jara 915,88.
**Konto Espero:** Finnlando: A. Mehtonen 111,60. Francio: H. Cortes 23,24; C. De Coudenhove 33,20; A. Gaillard 99,60; P. Hamon 13,28; L. Marin 99,60; O. Masseron 33,20; Y. Vidal 66,40. Germanio: B. Westerhoff 50,00. Nederlando: R. de Jong-Beukers 100,00; P. Rulofido 514,00. Sumo ĉi-jara 1144,12.
**Volontula Fondaĵo:** Nederlando: H.T. Gerrits 10,00; L. Staghouwer 25,00; A. Wester van der Veen 10,00. Sumo ĉi-jara 45,00.

**Al ĉiuj tre koran dankon!** UEA




**• Blinduloj: Levi la vualon**

En la usona eldono de la revuo *Reader's Digest* aperis en aŭgusto 1996 artikolo de David Lambourne, "Levi la vualon", pri sperto de neblindulo kiun kontakto kun blindulo instruis vere vidi. Ĉar la teksto havas grandan edukan valoron, delegito José Starck (Bld. des Guérets 46, BE-4900 Spa, Belgio) ŝatus ricevi ĝiajn variantojn en alilingvaj eldonoj de la revuo.

**• Gastronomio: Dulingvaj fiŝoj**

Antaŭ kelka tempo malfermiĝis en Oostende (Belgio) la restoracio La Maro (Kerkstr. 13, ☎+32/59/510-676), kun freŝaj fiŝo-specialaĵoj. La menuoj estas en la nederlanda kaj Esperanto. (*Vertikale*)

**• Instruado: Ekzoteco en Litovio**

Kiel menciite en lia nekrologo (feb., p. 40), en la pasinta printempo Marin Bacev ankoraŭ gvidis kursojn en Litovio. Lian elementan kurson en Klaipeda finis kvindeko da homoj, el kiuj dudeko daŭrigis per intensa parola kurso (2-6 dec.) gvidata de CHOE Taesok (Koreio), diplomito de la E-fako de Universitato ELTE (Budapeŝto). Post la lasta leciono okazis festeno en la nova klubejo 120-kvadratmetra, kiun ŝipofabriko senpage disponigas al la Klaipeda klubo. La nekutima fakto ke aziano gvidas kurson de eŭrop-devena lingvo altiris la atenton de lokaj ĵurnaloj, kiuj aperigis kursanoncon. En Koreio ne-aziaj vojaĝantoj esperantistaj ofte fariĝas portempaj E-instruistoj, ĉar kun ili plimultiĝas la atento de la lernantoj; similan efikon povas atingi azianoj en Eŭropo — komentas CHOE Taesok.

**• Komerco: Movado kun Vizio**

La mondfama svisa horloĝmarko Movado informas en siaj reklam-materialoj pri la Esperantaj origino kaj senco de sia nomo, same kiel pri la Esperanta signifo de Vizio, la nomo de ĝia ĵus lanĉita nova horloĝ-kolekto. (J. Rezende Piton)

**• Literaturo: Fervoja antologio**

Por sia jubilea 50-a kongreso (1998) Internacia Fervojista E-Federacio (IFEF) celas publikigi etan antologion de verkoj rilataj al fervojo. Kontribuoj, ĉu originalaj ĉu tradukaj (prefere malpli longaj ol 5 paĝoj), estas atendataj, antaŭ la 31-a de oktobro, ĉe la IFEF-sekretario: d-ro Romano Bolognesi, Via Misa 4, IT-40139 Bologna, Italio. (*Heroldo*)

**• Muzeoj: E-lingva spektaklo en Toruń**

En la Muzeo-Domo de la fama astronomo Koperniko en la urbo Toruń (Pollando), la 17-an de novembro, estis inaŭgurita spektaklo Esperantlingva "Sono kaj lumo" pri la historio de la urbo. Realigita dank' al pena laboro de la loka filio de Pola E-Asocio kaj Radio Toruń, la spektaklo estas unu el ok diverslingvaj variantoj. La muzeo kore invitas ĉiujn vizitantajn E-grupojn. Kontaktu: E-Societo FLAMO, Pf. 16, PL-87100 Toruń 1, Pollando. (*Eventoj*)

**• Politiko: Liberaluloj principe kongruas**

En kongreso (9 nov., Loveno) de la partio Reformantaj Liberaluloj (PRL) de franclingvaj belgoj, estis akceptitaj du rezoluci-amendoj de parti-membro kaj E-aktivulo Maurice Wouters: unu mencias Esperanton kiel "faktoron de internacia kulturo", la alia konstatas ke "la fundamentaj principoj de la E-movado, klarigitaj en la Praga Manifesto, kongruas kun tiuj de PRL". 120 ĉeestantoj aŭdis la novecan proponon, kaj 60 ricevis informilon kun la Praga Manifesto. (M. Wouters)

## Libro pri Hermann

Hermann D. Tautorat mortis la 19-an de majo pasintjare (vd. jul.-aŭg., p. 140). Li "estis homo plena je ideoj, je planoj, je interesoj", sed "li apenaŭ kapablis fini aferojn (...) tiel, ke ili povis esti prezentitaj al la granda publiko. Restos de li nur tio, kion ni memoras" — skribas lia filino Vera. Tial ŝi invitas ĉiujn "en kies kapoj kaj koroj restis memoroj pri li" priverki aŭ sonregistri ilin, por apero en redaktota "Hermann-libro". Skribu al Vera Tautorat, Prenzlauer Allee 87, DE-10405 Berlin, Germanio.

## NEKROLOGOJ

Cor BRUINS (1922-1996), prezidinto de la nederlanda ekzamen-komitato, ofta kontribuinto al E-revuoj, mortis la 16-an de decembro en Lejdeno. Krom *Kobo* de Ernst Claes, aperonta ĉe Flandra E-Ligo, pluraj liaj tradukoj (ekz. la nederlanda klasikaĵo *Pri la Vulpo Reinaerde*) atendas eldoniĝon.

**António CORREIA COIMBRA** (1930-1996), esperantisto ekde 13-jara aĝo, kiu prezidis Portugalan E-Asocion en ties tre sukcesa periodo inter 1985 kaj 1989, forpasis aŭguste en Lisbono. Kiam post 23 jaroj de eksplicita malpermeso la E-instruado en 1971 denove fariĝis ebla en Portugalio, li tuj lanĉis E-kursojn en la lingvolernejo kiun li direktoris.

**Ramona van DALSEM** (1929-1997) forpasis la 7-an de januaro en Zoetermeer. Post translokiĝo al Nederlando el sia naskiĝlando Indonezio, Esperanto donis al ŝi "la mankintan ekvilibron", kiel ŝi diris en intervjuo al Pola Radio. Ĉar ŝi "trovis ke ne ekzistas multaj originalaj E-kantoj", ŝi en 1967 registris ĉe UEA la diskon *La feliĉo* kaj samjare prezentiĝis al la E-publiko en la Roterdama UK. Sekvis la disko *Donu al mi vian manon* (1970), la kantaroj *Simplaj floroj* (1969), *Roseroj* kaj *Kantu kun Ramona* (1974), kaj la kasedo *En fora lando* (1988). Membro de UEA ekde 1963, ŝi ofte donacis al la Asocio.



**Ramona van Dalsem**

Dorothy FULFORD (1920-1996), dum kvarona jarcento delegito en Bristolo, fakdelegito pri SOS-aŭtoservo kaj virinaj aferoj, iama sekretariino de Bristola E-Societo, mortis en Redland (Britio) la 19-an de julio.

KUBO Sadazirô (1909-1996) forpasis la 31-an de oktobro en Moka (Japanio). Granda mecenato, esperantisto de 1927, li estis jam en 1943 estrarano de Japana E-Instituto, poste dum multaj jaroj ĝia diverspostena oficialulo, kaj fine ĝia prezidanto.

Vigdis KVALVAAG (1929-1996), dumviva membro, mortis la 15-an de decembro en Stavanger (Norvegio), kie ŝi estis pli ol 40 jarojn vicdelegito, poste delegito. Ŝi kunfondis en 1948 la lokan E-klubon kaj estis ties sekretario dum ĝia 20-jara ekzisto.

Albert LIENHARDT (1904-1996), dumviva membro de UEA kaj de Uniĝo Franca por Esperanto, honora membro de Franca Fervojista E-Asocio, forpasis la 23-an de novembro en Mulhouse (Francio). Konatiĝinte 20-jara kun Esperanto, li kreis post la dua mondmilito la eldonejon NOVA, kiu jam de 1946 publikigis vortarojn kaj lernolibrojn en Francio, i.a. lernilon por komencantoj (1955) kiun li mem verkis sub la anagrama pseŭdonimo Bernard Thaillet. Tre aktiva en la orient-franca movado, Lienhardt ne okupis oficialajn postenojn, sed iniciatis multajn kursojn ĉeestajn kaj korespondajn. Lia nomo iĝis tutmonde konata



Albert Lienhardt

pro la popularaj didaktikaj verkoj *Amuzaj dialogoj* (1973, 1980, 1981), *Facilaj dialogoj* (1982) kaj *Amuza legolibro* (1984, 1989). Dum siaj lastaj dudek jaroj li dediĉis sin al interlingvistikaj studoj kaj lanĉis la proponon *Optimala ortografio* (1978).

## Omaĝo

Aflikte mi legis pri la forpaso de Norman Williams (dec., p. 218). La prezentado de lia sindonema agado por nia movado estas ja longa, sed alia neforgesenda punkto en lia vivo estas liaj klopodoj propagandi nian lingvon en Rotariaj rondoj. Li sola restarigis en 1959 la "Rotarian Esperanto-Amikaron", fonditan en 1928 kaj malaperintan dum la dua mondmilito, kaj donis al ĝi la novan nomon Rotario-Asocio (nuntempe Rotaria Amikaro) de Esperantistoj (RADE, ĉar la emblemo de Rotario estas rado).

*Marc Levin (Francio), Sekretario de RADE*

Pierre LOUIS, 87-jara, verkinto kaj ilustrinto de la fama *Junulkurso* de SAT, forpasis en Angoulème (Francio). Organizanto de kongresoj de SAT kaj SAT-Amikaro, li dum pluraj jaroj gvidis E-kursojn en Nancy.

Osvald T. NICOLAISEN (1906-1996) forpasis la 25-an de oktobro en Stokholmo. Norvego, li Cseh-metode disvastigis Esperanton en norda Norvegio, kie deko da kluboj fondiĝis laŭ lia instigo. Post la milito, dum kelkaj jaroj, li estis la unua konstanta kongresa sekretario de UEA.

Karla OLSSON (1903-1996), dumviva membro, forpasis la 15-an de oktobro en Ystad (Svedio), kie ŝi estis delegito 30 jarojn kaj gvidis multajn kursojn. En sia testamento ŝi lasis sumon al UEA.

Juan Carlos RUIZ SIERRA (1953-1997), prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo, forpasis en Madrido la 1-an de februaro. Unu el la motoroj de la hispana movado, speciale la Madrida, li restas memorata ankaŭ kiel LKK-ano de la 78-a UK en Valencio (1993).

Eugen RYTENBERG (1906-1997) mortis la 21-an de januaro en Upsalo (Svedio). Li naskiĝis en Varsovio, kie li estis, ekde 1932, vicdelegito, poste delegito. Ekde 1930 li gvidis kursojn por blinduloj; en 1932 aperis lia E-lecionaro en brajlo. En 1939 li fuĝis antaŭ la germana invado al Rumanio, kaj fine, en 1947, ekloĝis en Svedio. Tie li aktivis en E-Societo de Uppsala, kiel vicprezidanto (1961-68, 1975-77) kaj prezidanto (1978-79). Ekde 1948 li denove servis kiel delegito tridekon da jaroj. Rytenberg de fore parencis kun Zamenhof: lia patro Felikso Rittenberg estis frato de Helena Rittenberg, la edzino de Felikso Zamenhof. Kiel tre juna knabo, li ĉeestis konversacion inter Zamenhof kaj Grabowski, dum kiu Grabowski diris al la knabo la frazon "Nigraj literoj sur blanka papero", montrante gazeton. Pro sia parenca ligo kun Zamenhof, li kun sia familio estis invitita de la pola ŝtato al la jubilea UK en Varsovio (1987).

Irena SEDOVA (1964-1996), konata junulara aktivulino, antaŭe delegito pri paco, lingvoj, etnografio kaj junulara delegito, forpasis post longa malsano la 4-an de oktobro en Sankt-Peterburgo. Multaj esperantistoj vizitis la urbon en ŝia akompano.

Marie SKAŘUPOVÁ (1913-1996), dumviva membro de Ĉeĥa E-Asocio, kunfondintino de la Somera E-Lernejo en Rožnov, mortis en septembro.



ZENG Heyao

ZENG Heyao (1922-1996) mortis la 27-an de oktobro, dum vizito al siaj filoj en Melburno. Esperantisto de 1939, li laboris inter 1940 kaj 1945 en Chongqing en la koresponda E-Lernejo, kun Ĵelezo, kaj en la redakcio de *Heroldo de Ĉinio*, sub Guo Moruo. Post kariero eldonkampa, li reaktiviĝis en 1980, kunfondante en 1981 Pekinan E-Asocion, en kiu li funkciis kiel vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario, poste prezidanto. Konstanta komitatano de Ĉina E-Ligo, vicdelegito en Pekino, li aliĝis en 1993 al Pasporta Servo.

## FRIENDSHIP FORCE

(= Amikiga Grupo) estas neprofita organizo fondita en 1977 de, inter aliaj, Rosalynn Carter, la edzino de la tiama usona prezidento Carter. FF aranĝas internaciajn vizitojn de, ekz., 20-personaj grupoj kiuj loĝas dum 1 semajno en la hejmoj de 20 alilandaj familioj en iu urbo. (Similas al nia Pasporta Servo, sed ne limigite laŭ lingvoj. La celo estas daŭra amikeco, ne loĝado.) Tiucele, FF nun havas 350 klubojn en 60 landoj kaj 42 usonaj ŝtatoj, sed konstante serĉas aliajn en ĉiuj landoj de la mondo. Mankas al ili la jenaj landoj kie estas Esperantaj delegitoj:

Albanio, Alĝerio, Argentino, Azerbajĝano, Bangladeŝo, Benino, Bjelorusio, Bolivio, Ebura Bordo, Finnlando, Greklando, Gvatemalo, Haitio, Honkongo, Irano, Jugoslavio, Kamboĝo, Kamerunio, Kartvelio, Kroatio, Luksemburgio, Madagaskaro, Makedonio, Malio, Nepalo, Pakistano, Portugalio, Rumanio, San-Marino, Slovenio, Srilanko, Svislando, Taĝikio, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Urugvajo, Venezuelo, Zairio, Zimbabvo.

Se vi povas helpi FF organizi klubojn en tiuj landoj, bv. kontakti Friendship Force, 57 Forsyth St., Ĉambro 900, Atlanta, GA 30303, Usono.

*R. K. Jones, FD, Ĉikago*

## SENĜENAJ DIALOGOJ


UEA aĉetis la stokon de ĉi tiu fascina verko de Alberto Fernández pri la fundamentaj natursciencaj demandoj (materio, atomo, tempo, gravito, evoluo, genetiko, biosfero). 197p. Multaj ilustraĵoj. La prezo malaltiĝis de 29,70 al 18,00 gld. *Triona rabato* ekde 3 ekz.




## Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KONTAKTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke KONTAKTO estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1997 KONTAKTO aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.




**ABONTARIFO 1997**

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | 28 | dolaroj | Francio | 120 | frankoj | Nederlando | 38 | guldenoj |
| Aŭstrio | 240 | ŝilingoj | Germanio | 34 | markoj | Norvegio | 140 | kronoj |
| Belgio | 700 | frankoj | Hispanio | 2100 | pesetoj | Pollando | 20 | guldenoj |
| Brazilo | 20 | guldenoj | Israelo | 29 | guldenoj | Portugalio | 2400 | eskudoj |
| Britio | 15 | pundoj | Italio | 31000 | liroj | Svedio | 150 | kronoj |
| Danio | 130 | kronoj | Japanio | 2600 | enoj | Svislando | 28 | frankoj |
| Finnlando | 100 | markoj | Kanado | 29 | dolaroj | Usono | 22 | dolaroj |

**Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

**FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!**

**fariĝu patrono de TEJO**

**Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:**
- *Kontakto;*
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn.

## INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

*Por esti ĝisdata pri la evoluo kaj faka literaturo de interlingvistiko kaj esperantologio*

*Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.*

## Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj. La rolo de planado en la homa komunikado. Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktas: Probal Daŝgupto, Klaus Schubert, Humphrey Tonkin

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519, Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.
Individua abono: 77,00 gld.
Institucia abono: 167,00 gld.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.

# SIMPLE LA PLEJ BONA!

**SESA ELDONO DE LA INTERNACIA LERNOLIBRO**




**Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld. Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.**



**En 1996 250 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al**

## Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA. Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1996 estis bela SZ-globkrajono. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

## *La Adelajda UK proksimiĝas...*




***...per kanguruaj saltoj!***

***Atende al Adelajdo, plibeligu viajn korespondaĵojn per la glumarko de la 82-a Universala Kongreso!***

***Diametro 36mm. Flavo kaj verdo sur blua fono. Folio de 10 glumarkoj: 3,00 gld. Triona rabato ekde triobla kvanto.***

## SOLENA SESIO, 14/04/97

Omaĝe al Esperanto la Ĉambro de Deputitoj de Federacia Distrikto de Brasília, propone de Deputito Renato Rainha, okazigos solenan sesion en tiu dato, senprecedenca realigo kiun la tutmonda esperantistaro, ties amikoj kaj familianoj bv. amase per dankleteroj saluti, menciante la nomon de la sukcesinta Deputito. Brazila Esperanto-Ligo iniciatis ĉe la Sekretariejo de Eduko de DF prizorgon por ebligi al profesoroj instrui Esperanton, ankaŭ enkondukatan en la Akademio de Civila Polico kaj Centro Interlerneja de Lingvoj. Adreso por la mesaĝoj: Deputada Lúcia Carvalho, M.D. Presidente da Câmara dos Deputados, SAIN, Parque Real, Brasília, DF. BR-70086-900.

**Fondaĵo Canuto**

***Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!***

## ... INFORME LOKSIDA ...

poŝtarta ekspozicio — mailart exhibition
06-20 ĝis 09-29-1997 (tempo de la Documenta X + 1 tago antaŭe kaj 1 tago poste)
ĉe brunsch & meyer, kunoldstr., kassel, frg

vi povas partopreni per via poŝtartaĵo pri la supra temo

limdato: 04-15-97
adresato: NULA HORO, Schulstr. 7, DE-34292 Ahnatal, FRG

Ĉi-somere haltu ĉe

# UNIVERSITATO DE HARTFORD

Usono

por la tradiciaj

## SOMERAJ ESPERANTO-KURSOJ

*6-11 julio 1997*

Partoprenu mezgradan kaj altnivelan intensajn kursojn kun instruistoj

Spomenka Štimec
Dorothy Holland
Joseph Conroy
Humphrey Tonkin

sur la bela antaŭurba tereno de la Universitato de Hartford en la ŝtato Connecticut.

Komforta loĝado en studentaj domoj por la tuta semajno, plus kurso: US$ 325.

Okazos ankaŭ elementa kurso por anglalingvanoj je sama prezo.

Skribu angle aŭ Esperante al:
Office of Summer Programs, University of Hartford
200 Bloomfield Avenue
West Hartford CT 06117-1599, Usono
☎ +1 860-768-4401 ℻ +1 860-768-5160
tonkin@uhavax.hartford.edu